

# EL POPOLA ĈINIO

中國新道



2000

ISSN 0032 - 4361

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

KUL

Esp.

ŭ - 19034/2000

**Bela Hainan-insulo**

**Raportoj pri la okcidenta Hubei-provinco (1)**

**Antikva muziko de naŝi-oj – konversacio kun dioj**

# ★ POPOLA ĈINIO



*Gastado  
en kam-  
parana  
familio* **34**




*Vestoj de  
blang-oj* **24**



*Familioj en  
groto*

*Historiaj signoj  
(II)* **15**



**20**  
*Antikva  
muziko  
de naŝi-  
oj*



- 3 **INTER NI**  
 4 **ĈINA KULTURO:**  
 Ĉina ideografio, moro kaj etiketo  
 6 **OMAĜE AL LA ORA JUBILEO DE EPC:**  
 Parolado de koroj  
 7 **GRATULOJ AL LA ORA JUBILEO DE EPC**  
 8 **ĈINAJ E-ISTOJ:**  
 lo Chou, eminenta entomologo kaj batalanto  
 sub verd-stela standardo  
 10 **50 JAROJ — EPC:**  
 Esperanto — paco — Ĉinio; Kiel mi kreskis  
 kun "El Popola Ĉinio"; EPC kaj mi  
 13 **POR KOMENCANTOJ:**  
 Indiferentaj herboj  
 14 **ESP-NOVAĴOJ**  
 28 Mia Esperanta ĝardeno  
 37 **KURANTAJ AFEROJ**  
 38 **EL ĈINAJ GAZETOJ**  
 40 Bela Hainan-insulo  
 42 Raportoj pri la okcidenta Hubei-provinco (I)  
 44 Rekompenco por montvilaĝa patrino  
 46 En pitoreska urbeto Xikou  
 48 Alloga ĉina akrobatiko  
 50 **SUR NIA LIBROBRETO:**  
 Amo kaj saĝo donas forton

## INTER NI

En la tradicia ĉina kulturo la ĉinaj ideogramoj sendube estas tre gravaj. Nia revuo iam konigis ĉinajn ideogramojn, tamen niaj legantoj deziras legi pli da tiuflankaj artikoloj. En tiu ĉi numero la artikolo "Ĉina ideografio, moro kaj etiketo" pritraktas, kiel oni kreis ideogramojn laŭ la formo de objektoj por esprimi ilian sencon kaj kiel riĉajn kulturajn informojn ili enhavas. "Rekompenco por montvilaĝa patrino" estas artikolo pensiga. La patrino estas instruistino de montvilaĝa elementa lernejo kaj ŝia edzo — malriĉa kamparano. Venkinte grandajn malfacilojn, ili sukcese elkulturis siajn tri filojn. Krom solvi la financajn problemojn, ili devis ankaŭ bone koni sciencojn kaj posedi ilin. Koncerne aliajn artikolojn, ekz. "Alloga ĉina akrobatiko" kaj "Bela Hainan-insulo", niaj legantoj eble scias iom, leginte iamajn artikolojn, tamen la nunaj artikoloj konigas al ili ion novan. Se niaj legantoj venos al Ĉinio por ĝui ĉinajn akrobataĵojn aŭ viziti Hainan-insulon, ili certe havos pli bonajn perceptojn.

La Red.



Blang-aj knabinoj  
 Foto de Liu Sigong

Blang-aj virinoj vivantaj en profunda montaro havas la kutimon sin ornamati per diversaj floroj. Naturdotitaj, ili utiligas diversajn sovaĝajn florojn kreskantajn en profunda montaro por beligisian vivon. Jen blang-aj knabinoj ornamataj antaŭ ekiro.

## EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo  
**Redaktata** de Redakcio de "El Popola Ĉinio"  
**Distribuata** de Distribua Fakoj de "El Popola Ĉinio"  
**Direktoro:** Wang Xifu  
**Adreso:** P.O. Kesto 77, Beijing 100037, Ĉinio  
**Telefono kaj telefakso:** +86-10-6832 1808  
**Retpoŝto:** epc@china-report.com  
**Hejmpaĝo:** <<http://www.china.org.cn/EIPopolaCxinio>>

8[503]2000



# Ĉina ideografio, moro kaj etiketo

"Laŭ la scienca vidpunkto, la ĉina ideografio havas logikan kaj striktan strukturon, kaj laŭ la beletra vidpunkto, ĝi estas senkompare bela bildo."

de PANG BIAN

**P**OR studi la politikon, ekonomion, kulturon, militan sciencan, socian vivon kaj aliajn flankojn de la antikva Ĉinio, ĉinaj arkeologoj antaŭ ĉio analizas la formojn de la ĉinaj ideografiaĵoj. Ĉar en kreado de ideografiaĵoj la prauloj prenis la formojn de objektoj por esprimi la sencon, kaj la antikva ĉina ideografio enhavas riĉan kulturajn informojn.

Iu specialisto diris: "Laŭ la scienca vidpunkto, la ĉina ideografio havas logikan kaj striktan strukturon, kaj laŭ la beletra vidpunkto, ĝi estas senkompare bela bildo." Tiu ĉi artikolo, laŭ la strukturo kaj desegno de kelkaj ideografiaĵoj, disvolvigu esploron pri la moro, etiketo kaj ideologio enkorpigita en ili.

## 文 KAJ TATUO

En la unua tempo la ideografiaĵoj estis gravuritaj sur testudaj ŝeloj kaj bovaj skapoloj. Tiam la vorto 文 estis skribita kiel 文, signifanta "skribaĵon", "artikolon", "lingvon" k.a. Tiu ideografiaĵo similas al staranta homo kun desegnoj sur la brusto. Ĝi registris la tatuan moron de la prauloj.

Specialisto rezonadis, ke la moro de tatuoj originis de totemismo de la prauloj. Tiam

la homoj opiniis, ke ilia klano havas ian rilaton kun besto aŭ vegetalo, aŭ kun la suno, la luno, aŭ eĉ ŝtono, kaj ili pentris aŭ tatus la figurojn de tiuj aĵoj sur sian frunton aŭ korpon kiel klanan simbolon kaj amuleton. La li-oj sur Hainan-insulo konservis la tatuan moron ĝis la 50-60-aj jaroj de la 20-a jc. Poste, kiam la netatuitaj homoj edziĝis, kultis aŭ entombiĝis, oni faris sur ilia korpo ian simbolan desegnon por garanti la sanktecon de la aktivado. Iuj fakuloj supozis, ke la tatua moro de Li-nacio originis de primitiva "kuraco". La nacioj vivis en varma kaj pluvoza arbaro kaj montaro, kaj estis facile infektitaj de haŭtaj malsanoj, kiuj kaŭzis neelteneblan jukadon. Ili pikadis la jukantan lokon anstataŭ grati, kaj tio donis bonan efikon kaj iom post iom fariĝis moro de tatuoj.

En Taiwan vivas Taiya-nacio, kiu havas belan rakonton pri tatuoj. Foje iu viro diris al virino: "Vi estas malbela, sed tatuoj sur la vizaĝo beligos vin." Kaj li prenis fulgon kaj faris desegnojn sur la vesto de la virino kaj instruis tion al ŝi. Tiu nacio havas multajn regulojn pri tatuoj, ekzemple iuj desegnoj estis simbolo de riĉeco kaj rango, kaj membroj de malaltaj klasoj ne rajtis havi tiujn desegnojn. Viroj rajtis tatus sian vizaĝon nur post kiam ili militakiris la kapojn de malamikoj. Se ili militakiris la

kapojn de malamikoj per difinita armilo, ili rajtis tatus la ventron, kaj se ili militakiris multe da kapoj, ili rajtis tatus sian bruston kaj manojn. Virinoj rajtis tatus sian vizaĝon nur post kiam ili ellernis teksti jakon. Se virinoj estis elstaraj aŭ elpensis novajn desegnojn, ili rajtis tatus la bruston, manojn kaj femurojn. En Paiwan-nacio de Taiwan nur aristokratoj rajtis tatus sin, sed viroj de nearistokrataj familioj povis aĉeti de sia tribestro la rajton tatus sin, se ili multe akiris en milito aŭ oferis multe da riĉaĵoj. Ankaŭ virinoj de ordinaruloj edziniĝintaj al aristokrato rajtis tatus sin.

## 楚(楚) KAJ KAMPO EL BRULIGADO

En la pratempo ĉie estis densaj arbaroj kaj la prauloj sin nutris per sovaĝaj fruktoj kaj bestoj. Ili posedis multajn metodojn por kapti bestojn, ekzemple ŝtonĵeto, arkapafado, uzo de reto kaj enfalilo aŭ bruligado de arbaro por elpeli la bestojn. Ni analizu la ideografiaĵon 楚(楚) gravuritan sur bova skapolo signifanta bruligon. La supra parto de 楚(楚) signifas arbaron, kaj ĝia malsupra parto — fajron, do tiu ideografiaĵo signifas "bruligi arbaron per fajro".

Dum evoluado de la socio la homoj ellernis agrokulturon, sed daŭras la kutimo krei



kampojn per arbarbruligado, ĉar la homoj opiniis, ke tiu maniero estas pli facila kaj la cindro sterkas la kampojn. Sed tiaj kampoj baldaŭ magris kaj sekiĝis post 2-3 jaroj, kaj la homoj devis migri aliloken por krei novajn kampojn. Tiu maniero kaŭzis, ke pli kaj pli rapide malmultiĝis la arbaroj, pereis multaj animaloj kaj vegetaloj, katastrofis diluvo kaj dezertiĝis la tero. Prudentaj prauloj antaŭvidis la fatalan rezulton de tia kampokreado. Filozofo Han Feizi (ĉ. 280-233 a.K.) diris: "Oni perdos por ĉiam fiŝojn, se li sekigos la lagon por akiri fiŝojn; oni perdos por ĉiam bestojn, se li bruligos arbaron por ĉasi." Li avertis, ke oni neniam devas damaĝi la longatempajn interesojn por ĉasi profiton en la proksima periodo. Sed la homoj malfruege komprenis lian averton. La ideografiaĵo 焚 (fano) sur bova skapolo pensigas la homojn, ĉar ĝi notis la lecionon por la homaro.

## 祭 KAJ RESPEKTO AL LA PRAPATROJ KAJ DIOJ

Prauloj de Ĉinio firme kredis, ke la prapatroj havas animon, kaj kulto al la forpasintaj prapatroj patronos la kultantajn posteulojn. Tial la kulto al la prapatroj kaj dioj profunde radikiĝis en la ideologio de la homoj. Etiketo en la antikveco difinis: "La ĉiela filo (imperiestro) ĝuas sep templojn, regnestro kvin, grandsinjoro tri, erudiciulo unu; kaj plebano estas kultata nur en tombejo." Templo estas ejo por loki la animon de la forpasintoj kaj kulti prapatrojn kaj diojn. Kiel kulti? La formo de la ideografiaĵo 祭 (kulto) helpas nin kompreni. La ideografiaĵo konsistas el la supra kaj malsupra partoj. La dekstra supra parto

estas mano, kaj la maldekstra supra parto — peco da viando, kaj la malsupra duono signifas ŝtonan tableton por oferaĵoj. Do la ideografiaĵo el la kunmetitaj pecoj signifas, ke oni metas per mano viandopecon sur la tableton por oferaĵoj.

Multaj ĉinaj ideografiaĵoj havas rilaton kun kulto. Ekzemple la ideografiaĵo 血 (sango) en bronza ujo estas gravurita kiel 𩺰. 𩺰 montras ujon, kaj 𩺰 signifas sangogutigadon, nome oni gutigas sangon en la ujon. Prauloj rigardis sangon kaj viandon plej valoraj



kaj plej bongustaj manĝaĵoj, tial ili unue devis oferi tiujn al la prapatroj kaj al la ĉielo, la tero, la monto, la arbo kaj aliaj dioj. Ĉe iuj nacioj estas la kutimo ŝmiri la muron, pardon kaj fenestron de nove konstruita domo per bruta sango, ĉar la nacioj kredis, ke tio evitigos la herezaĵojn.

## 孝 KAJ "PLEJ GRANDA PEKO"

Per simpla "fileco" ni traduku la ideografiaĵon 孝, la familian moralon de la antikva socio. 孝 larĝasence inkluzivas minimume respekton kaj obeemon de la juna generacio al la gepatra kaj pli altaj generacioj. Antikvuloj opiniis, ke la plej granda peko

kontraŭ "fileco" estas ne edziĝi, sekve ne havi filon por daŭrigi la familion.

Tia koncepto estis sendevia daŭro de generokulto ĉe la prauloj. Kiam la moralo pri "fileco" estis derivita, la prauloj elpensis la ideografiaĵon 孝 por akcenti la seriozecon de la plej granda peko de senideco. Supre maldekstre de la ideografiaĵo estas kaduka maljunulo kun longa hararo kaj kurba dorso, li etendis unu manon sur la kapon de la filo 子 sube dekstre de la ideografiaĵo. Tio aludas, ke havo de filo konformas al "fileco", kaj kompreneble la filo tenas altan respekton al la maljuna generacio.

## 𩺰 (侯) KAJ GASTIGADO

En la antikveco 𩺰 (侯) signifas "akceptanton de gasto". Laŭ la skribsistemo sur testudaj ŝeloj kaj bovaj skapoloj, la ideografiaĵo 𩺰 (侯) konsistas el tri partoj: 𩺰 simbolas domon, kaj en la domo estas du homoj, unu staranta kiel 𩺰 kaj la alia genuanta kiel 𩺰. Kaj la

kunmetaĵo signifas, ke gasto estas bonvenigata de la genuanta mastro.

Genuiĝi sur la planko estas ĝentilaĵo en akcepto de gasto en la antikva Ĉinio. Tiu rito havas la rilaton kun mato. La ideografiaĵo "mato" skribita sur testudaj ŝeloj aŭ bova skapolo estas 𩺰. Kiam ankoraŭ ne estis tablo, seĝo kaj lito, mato sur la planko servis kiel meblo. La homoj manĝis genuante. Kaŭre sidi estis malĝentila maniero. Foje la edzino de Mengzi, ĉina antikva pensulo, kaŭrante laboris sola hejme kaj estis rimarkita de la edzo. Ĉi tiu preskaŭ repudiis ŝin. En la antikveco kleruloj akcentis "singardemon dum sola restado", opiniante, ke oni devas esti pli singarda kaj ĝentila, kiam li estis sola. ■

# Parolado de koroj

de VLADIMIR DEREVJANKO  
(Rusio)

**F**OJE en oportuna malgranda ĉambro, mi kun miaj junaj geamikoj trarigardis freŝan numeron de la gazeto "El Popola Ĉinio", kompleze liverita al ni el ne tre konata lando Ĉinio.

Ili estis iom ekscititaj kaj interparoladis pri diversaj landoj. Bedaŭrinde la vetero ne estis tre suna.

"Karaj junuletoj," diris mi, "rakontu kiel vi imagas al vi malproksiman landon Ĉinio."

"Ho, mia pli aĝa amiko, Ĉinio, kiel mi imagas, aspektas kiel bela flava suna floro, kiu alportos feliĉon kaj ĝojon al ĉiuj."

"Kaj la ĉinaj homoj, al mi ŝajnas, similas al laboremaj gajaj abeloj, kiuj bonege ĉion konstruas kaj nutras ĉiujn," aldonis alia junuleto.

"Kaj nia amata gazeto similas al multkoloraj belegaj papilioj, kiuj facile flugetas tra la tuta mondo kaj trankviligas, amikigas ĉion sur nia belega planedo," emocie aldonis knabino.

Dum la interesa babilado mi rimarkis kiel ekbrilis kaj ekpetolis klaraj okuloj de miaj junaj amikoj, kaj ili iĝis pli scivolemaj.

Ili revis, babilis, babilis...

La junuletoj kvazaŭ estis en amata fora lando. Iom post iom suno alte leviĝis, la tago heliĝis, humoro pliboniĝis. Kaj tiam mi ekvolis paroli rime:

*Fiera, enigma, belega Ĉinio  
Akceptu saluton de ni el  
Rusio.*

*Dank' al gazet' "El Popola  
Ĉinio"  
Ni konatiĝis, ekamis Ĉinion.*

*Bela naturo kaj ĝojaj homoj,  
Sunaj infanoj kaj brilaj koroj.  
Popolo dancema, amika kaj  
saĝa,  
Ĉu vi divenu kiom ĝi aĝas?*

*Belaj virinoj, junuloj kaj viroj  
Talenta popolo - indas  
admiron.  
Riĉ-historio de ĉiu nacio*

*Vivu, prosperu la lando  
Ĉinio!*

*Vivu kaj glori, amata gazeto  
Kaj amikigu la tutan Planedon.  
Flugu rapide tra l' Mondo  
en kiu  
Ĝi bezonatas al ĉiu, al ĉiuj.*

Kara Redakcio, akceptu ankoraŭ niajn bondezirojn kaj sukcesojn al vi kaj via gazeto okaze de la 50-jara jubileo de la fondiĝo. ■

## Serĉo de e-istoj en Norda Koreio

Ŝajnas ke la aŭroro de reunuiĝo de la du Koreioj kaj paco venas. En la 15-a de junio la prezidantoj de ambaŭ landoj konsentis en 5 punktoj. Ĉiuj koreoj, sudaj kaj nordaj, bonvenigas la interkonsenton kaj ambaŭ landoj nun sin preparas por detale plani ĝian plenumon.

La interkonsento ankaŭ havas signifon en nia E-movado. Antaŭ longa tempo estis multaj e-istoj en Norda Koreio. Sed poste ni aŭdas nenion de ili. Ankaŭ la Ĉina E-Ligo aŭdas nenion. Mi supozas ke nia movado en Norda Koreio estas dormanta. Tio donas al sudkoreaj e-istoj novan taskon vekti la movadon en Norda Koreio. Mi esperas, ke la Tutkorea E-Kongreso okazos ene de 10 jaroj.

Peton! Se vi konas iun nordkorean e-iston, bonvole sciigu al mi rete: <Lee@esperanto.net>.

**Lee Chong-Yeong, prezidanto  
de Korea Esperanto-Asocio**

Mia nomo estas Hai Ly "Bela Maro". Mi estas 22-jara vjetnama studentino ĉe la Instituto de Internaciaj Rilatoj. Mi esperantistiĝis en 1995 kaj kelkfoje trovis numeron de "El Popola Ĉinio" kaj legis ĝin kun granda intereso. Mi vere admiras vian revuon pro la alta lingvonivelo kaj ankaŭ pro la riĉa provizo de materialoj rilataj al la kulturo de Ĉinio.

Fine, mi reesprimas mian altan estimon al ĉiuj miaj gesamideanoj, kiuj laboras tiel eminente kaj sindoneme por la granda E-revuo, kiu laŭ mia opinio estas vera perlo en nia Esperantujo.

**Hai Ly ("Bela Maro")**

Estimataj gesamideanoj,

Koran gratulon al la belega gazeto "El Popolo Ĉinio". Ĝi estas belega! Mia unua abono de EPĈ komenciĝis en la 30-a de oktobro 1969, kaj la abonprezo estis tiam 5 nederlandaj guldenoj jare.

**Henriko Beverloo (Hollando)**

Nome de la Ukraina Esperanto-Asocio kaj de mi persone, mi elkore gratulas verŝajne la plej belan E-revuon okaze de la jubileo! 50 jaroj — tio estas ege serioza!

Dum miaj multenombraj rakontoj kaj prelegoj pri Esperanto mi neprege montras kelkajn ekzemplerojn de EPĈ kaj ĉiam emfazas la rolon de la Internacia Lingvo en informado pri Ĉinio pere de la revuo.

Deziranta ĉiajn sukcesojn en via nobla kaj tre utila agado,  
Plenestime kaj sincere,

**Mikaelo Lineckij por UkrEA**

La Kolombia Junulara Esperantistaro salutas kaj gratulas vin kore. Via laboro estas tre bela kaj entuziasmiga, vi ja disvastigas Esperanton kaj uzas plenplene ĝian belecon. Ni havas junularan grupon kiu volas havi belan magazinon kiel tiu via.

**Kolombia Junulara Esperantistaro**

Mi ne povas ne admiri la ĉinajn gee-istojn pro ilia senegala nobleco en la E-movado kaj energio en la E-aktivado. Neniu alinacia komunumo Esperanta rajtas havi pli grandajn pretendojn pri la klopodo por disvastigi Esperanton tra la mondo. Unu el la pruvoj estas la magazino "El Popola Ĉinio", kiu estas sendispute la sola Esperanto-revuo, kiu povas efektive rivali kun la grandaj, samspecaj nacilingvaj publikigaĵoj.

Al la ĉinaj geesperantistoj mi, do, prezentas mian respektigon kaj gratulegon!

**Carlos I. de Jesus**



# Io Chou, eminenta entomologo kaj batalanto sub verd-stela standardo

*Antaŭ nelonge la 88-jara profesoro Io Chou kuŝis en la Popola Hospitalo de Xi'an pro malsano. S-ro Cheng Andong, provincestro de Shaanxi, vizitis lin kaj diris al lia kuracisto: "Faru ĉion eblan por resanigi lin, ĉar li estas pli grava ol mi!" Nun la profesoro jam resaniĝis kaj elhospitaliĝis. Kiel ĉiuj aliaj, kiuj amas kaj estimas lin, ni deziras al li bonan sanon kaj longan vivon.*

**La Red.**

de SHEN HONGLEI

**E**NIRINTE la entomologian muzeon en Yangling en la antaŭurbo de Xi'an, oni tuj vidas vivoveran bronzan statuon. Ĉiutage iu maljunulo preterpasas la statuon. Ili ambaŭ portas la saman nomon — entomologo Io Chou. Tia honoro estas malofta en Ĉinio.

La nomita muzeo, fondita en 1987, estas la unua ĉina entomologia muzeo, por kiu oni investis preskaŭ 9 milionojn da juanoj (ĉ. 8.3 juanoj egalas al unu usona dolaro). En la muzeo estas konservataj pli ol 700 000 specimenoj de raraj insektoj kaj pli ol 10 000 ekzempleroj da fakaj libroj. La kvar grandaj helaj eksponejoj prezentas la insektan mondon kaj ankaŭ la vivovojojn de la maljunulo rilate lian scian esploradon.

"Origine en la mondo ne estis distingo inter insektoj utilaj kaj malutilaj. La naturo havas sian bioĉenon. Antaŭe en ekonomie postĝintaj regionoj oni forbruligis sovaĝajn herbojn por ekspluati virgan teron, kaj tio detruis arbarojn, la bioĉenon de insektoj, ke ĉi tiuj povis trovi nenion krom plantoj por manĝi, kaj tial ili fariĝis malutilaj en la okuloj de la homoj. En la mondo oni uzas

insekticidon kontraŭ insekta plago, sed tio malutilas al la kreskado de plantoj kaj minacas la vivon de aliaj insektoj, kiuj tamen havas la rajton de vivado." En la kabineto de prof. Io Chou raportistoj intervjuis tiun estimatan maljunulon, kaj liaj simplaj vortoj kondukis ilin en la insektan regnon.

Prof. Io Chou naskiĝis en 1912 en ordinara kamparana



Prof. Io Chou en la entomologia muzeo

familio en la suda ĉina provinco Zhejiang. En la infaneco li helpis siajn gepatrojn kolekti brullignon sur monto kaj ekamis ĉion en la naturo. Sub ilia eduko li lernis diligente. Influate precipe de prof. You Qiwei, li montris grandan intereson pri insektoj. 24-jara, li diplomiĝis el la Agronomia Kolegio de Nantong-universitato en Jiangsu-provinco. Por bone posedi fakajn sciojn kaj savi la suferoplenan patrujon, li vojaĝis

en 1936 al Italio por studi en la Universitato de Napoli, kie prof. F. Silvestri, mondfama aŭtoritato de sistematika entomologio, gvidis lian studon.

La 7-an de julio 1937 okazis Lugouqiao-evento. La patrujon ofendis la japanaj invadantoj. Propraokule li vidis, ke ankaŭ la italaj faŝistoj pli kaj pli arogantis samtempe kun tio. Li forte indignis kaj prezentis al prof. F. Silvestri sian motivon "Ĉu utilas mortigi nur malgrandan insekton anstataŭ grandan?" kaj adiaŭis lin por reveni la patrujon. Tuj en la sekvanta tago de sia reveno en Kantonon aprile de 1938 li armeaniĝis kaj iris al fronto por batali kontraŭ la japanaj invadantoj. Poste la diviziestro informiĝis, ke li estas erudiciulo ĵus reveninta el eksterlando, kaj malmobilizis lin.

Post kiam li fariĝis profesoro de la Nordokcidenta Agronomia Instituto, li oficvojaĝis tra la lando, spertante multajn malfacilojn. Li kolektis pli ol 400 000 specimenojn de insektoj, kaj 40 el la insektospecioj oni titolis per lia nomo. Li klopodadis por fondo de la entomologia muzeo. Dank' al lia energia laboro la muzeo fariĝis ĉina ekspertiza centro kaj bazo de sistematika



En eksponejo de la entomologia muzeo

entomologio pri kamparaj kaj arbaraj insektoj. Li verkis ĉ. 200 fakajn librojn kaj disertaĵojn. En 1996 li dufoje ricevis la oran medalon de F. Silvestri de Italio kaj fariĝis membro de la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino.

Lu Zheng, lia edzino, estas fratino de eminentulo Lu Jianbo, kiu kune kun s-ano Bakin dediĉis sian energion al la ĉina Esperantomovado. Tiujare, post la malmobiliziĝo, Io Chou loĝis ĉe sia kunlernanto Lu Jianbo. Ili interparolis pri sciencoj kaj pri la bela estonteco de Esperanto. La 19-jara Lu Zheng estis magnetita de la amiko de sia frato. Ŝi kune kun Io Chou iris al la ĉina agrikultura lulilo Yangling. Poste ankaŭ ŝi profesoriĝis en la Nordokcidenta Agronomia Instituto. La alta idealo de la homaro kunligis ilin. Ŝia amo al la edzo kondukis ŝin al amo al insektoj. Nun iliaj kvin gefiloj feliĉe vivas en diversaj urboj de Ĉinio. Prof. Io Chou vivtenis siajn gefilojn per laborakiro el la entomologia esplorado kaj ne havis multe da ŝparmono, sed li ŝparis ĉiun groŝon por aĉeti grandan kvanton da valoraj libroj. Inter la libroj konservataj en la entomologia muzeo pli ol 2 500 estis donacitaj de prof. Io Chou, kaj 185 el liaj donacitaj libroj estas unikaj en Ĉinio. Aŭguste de 1996 ĉina vicĉefministro Li Lanqing vizitis la muzeon kaj laŭdis lin pro lia

kontribuo al la ŝtato kaj lia sindediĉo al la scienca esplorado.

Dum nia intervjuo prof. Io Chou diris al ni: "La insekta influo sur la homoj iam estis eĉ neatendita. Plurfoje oni malsukcesis dragi la Panaman Kanalon, kaj unu el la kialoj estas, ke moskitoj atakis laboristojn kaj kaŭzis al ili malarion, kiu forrabis la vivon de multaj el ili." En 1984 li vojaĝis al Nanning kaj survoje vidis grandan pecon da sukerkana kampo komplete plagita de insektoj, kaj la flava kampo- etendaĵo estis kvazaŭ bruligita. La katastrofo minacanta la homaron neniam deŝiris lin de la entomologia esplorado.

Dum la pasintaj 60 jaroj prof. Io Chou estis ne nur diligenta en sia faka laboro, sed ankaŭ vigla en la Esperanta movado. Li verkadis en Esperanto. Post la fondiĝo de la Esperanto-Asocio de la Nordokcidenta Agronomia Instituto li funkciis kiel ĝia ĝenerala direktoro. Foje li publikigis kun aliaj 19 agronomoj publikan leteron al la progresemaĵoj de ĉiuj landoj alvokante, ke ili verku sciencan disertaĵon en Esperanto kaj plene utiligu Esperanton, por ke la sciencoj fariĝu komuna riĉaĵo de la homaro. Li diris: "Esperanto ekzistis jam 100 jarojn en Ĉinio, kaj mi eklernis ĝin antaŭ 70 jaroj. Mi bone parolas la italan lingvon kaj ankaŭ povas skribi disertaĵon en la angla, sed mi

preferas Esperanton, kion decidas nia nacia digno." Antaŭe li korespondis en Esperanto kun fama hortikulturisto I. V. Miĉurin kaj iuj entomologoj kaj foje sendis al Miĉurin frukto-semojn.

Prof. Io Chou diris al la raportistoj, kiuj estis kortuŝitaj de li: "Same kiel vi, mi estas sentimentalaj kaj ekscitiĝema. Mi ege dankas vin pro via afabla estimo. Sciencisto devas esti patriota, devokonscia, akordiĝema kaj tempo-domaĝa."

Prof. Io Chou estas ŝarĝita de multaj laboroj. Ĉiutage li laboras pli ol 10 horojn. Ni vidis sur lia tablo "Servosoldato sub verda armea standardo", "Ĉina oraflugila herminio" kaj "Insekta atlaso de Io Chou", kiujn li aperigis antaŭ nelonge, kaj "Ĉinaj papilioj (daŭrigo)", "Katalogo de ĉinaj longflugilaj papilioj", "La ĉina papilia kulturo" (historio, rakontoj, ilustritaj tekstoj, silkaj brodaĵoj kaj poeziaĵoj pri papilioj) kaj "Ilustrita libro pri mondfamaj papilioj", kiujn li kompilas nun.

Pri la estonteco prof. Io Chou diris: "Silkraŭpoj manĝas morusfoliojn por doni silkajn fadenojn. Ĉe la komenco ĝi ne donas silkajn fadenojn, kvankam ĝi manĝas multe da morusfolioj. Ŝajnas al mi, ke mi estas satmanĝinta silkraŭpo preta doni bonajn silkajn fadenojn, kaj mi ne povas forlasi tiun ĉi mondon, antaŭ ol fordoni la silkajn fadenojn." ■

# Esperanto – paco – Ĉinio

de DINKO MATKOVIC (Kroatio)

**A**NTAŬ 70 jaroj unu Zamenhofa semo flugis al la Adriatika Maro kaj falis sur la ĉiamverdan insulon Hvar, kiu tiam troviĝis en la reĝa Jugoslavio. La semo trovis favoran grundon en unu ĉemara vilaĝo, kie kelkaj ŝuistoj entuziasme akceptis post la Unua Mondmilito ideojn de Karl Marx kaj Lenin. Laŭ rekomendo de la tiama Komunista Partio ili lernis la internacian lingvon Esperanto. Tiucele ili havigis al si kelkajn E-librojn (vortaroj, Fundamenta Krestomatio, Leteroj de Lanti, kelkaj libretoj de SAT) kaj ricevadis E-gazetojn (La Suda Stelo, Esperanto, Sennaciulo). Unu el ili, kiu nomiĝis Havana Toma, estis persista en la lernado kaj restis fidela esperantisto ĝis sia morto en 1963. Li eĉ gvidis kurson en El-Shatt (Egiptujo), kie multaj loĝantoj el la ĉemara regiono troviĝis en la rifuĝinta kampadejo post la kapitulaco de faŝista Italio en septembro 1943. En 1941, kiam naziista Germanio kaj faŝista Italio atakis Jugoslavion, mi estis 15-jara lernanto. Kun knaba scivolo mi foliumis Esperanto-kroatan vortaron, kie troviĝis ankaŭ gramatikaj reguloj. Kompare kun la germana, kiun mi lernis en mezlernejo, Esperanto estis multe pli simpla kaj facila. Sed de 1943 mi ne povis lerni Esperanton, ĉar mi partoprenis popolliberigan batalon, kies celo estis ne nur venki okupantojn kaj iliajn helpantojn, sed ankaŭ batali por socialismo. En tiu milita jaro mi iĝis radiotelegrafisto. En majo 1945, kiam la Dua Mondmilito finiĝis en Eŭropo, mi ne volis resti en armeo, ĉar

mi deziris daŭrigi mian lernadon. Nova socialisma Jugoslavio favoris Esperanton kaj en Beogrado kaj Zagrebo, kie mi studis, mi povis ekzerci Esperanton en E-kluboj. Tiel mi konatiĝis kaj amikiĝis kun multaj esperantistoj. Mi studis la anglan kaj kroatan lingvojn (mia gepatra dialekto diferencas de la norma kroata lingvo) kaj mi povas diri, ke Esperanto helpis al mi lerni tiujn lingvojn, ĉar ĝi donas bonan lingvistikan bazon. Bona Esperanto-angla vortaro de Edward Millidge helpis al mi ankaŭ lerni anglajn vortojn en komparo kun la Esperantaj.

Grava instigo por mi en mia esperantista vivo estis ankaŭ la 38-a UK okazinta en Zagrebo en 1953 kaj mi publikigis raporton pri ĝi kaj poste mi partoprenis kelkajn nialandajn kaj internaciajn E-renkontojn kaj mi skribis pri Esperanto en kelkaj gazetoj. Aparte grava por mi estis la Internacia Pedagogia Seminario okazinta en 1960 en Bohinj, Slovenio. Al tiu slovenia lago venis instruistoj de kelkaj eŭropaj landoj. S-ano M. Erbeta el Svisujo konatigis nin pli detale kun interlerneja korespondado konata sub la nomo "Grajnoj en vento". Krom la angla lingvo instruata dum regulaj lernejoj, mi instruis al lernantoj ankaŭ Esperanton en la lernejo en nemultnombraj grupoj po 2 lecionojn semajne. Tiuj lernantoj, kiuj elektis Esperanton libervole, skribis, pentris, kolektadis ilustritajn poŝtkartojn, poŝtmarkojn, monerojn kaj fotojn – ni devis kelkajn samformatajn paĝojn multigi en 15-20 ekzemplerojn kaj sendi al grupestro, kiu ricevadis tiajn sendaĵojn el diversaj eksterlandaj

lernejoj kaj li resendis al ni albumon. Ni apartenis al la 4-a rondo kaj tiel miaj lernantoj povis ekscii multe pri siaj samaĝuloj el diversaj landoj.

La renkontoj kun esperantistoj ne nur en diversaj lokoj en eksa socialisma Jugoslavio, sed ankaŭ en eksterlando (Vieno, Salzbargo, Triesto, Milano, Ausburgo, Freiburg, Oksfordo, Londono, Parizo, Prago, Varsovio, Kievo kaj Leningrado) konvinkis min, ke esperantistoj estas pli kulturaj, pli amikaj kaj pli helpemaj ol aliaj homoj. Jarlibroj de UEA kaj SAT multe helpas por plani vojaĝojn kaj ankaŭ dum vojaĝoj. Dank' al Esperanto mi bone konatiĝis kun Slovenio kaj ellemis ankaŭ la slovenan lingvon. Do, Esperanto helpis al mi multe por larĝigi mian scion kaj multigi miajn vivspertojn.

Mi ne memoras, en kiu jaro mi fariĝis abonanto de la monata gazeto EPĈ, sed mi pensas, ke mi apartenas al la unuaj abonantoj. Tiel mi povis sekvi disvolvon en tiu vasta lando, kiu dank' al tiu revuo ne estas malproksima por mi, ĉar mi povis ne nur vidi belegajn fotojn, sed ankaŭ legi diversajn artikolojn (mi eĉ tradukis unu artikolon pri la influo de konfuceanismo je ĉinoj kaj sendis al unu gazeto, sed, bedaŭrinde, ĝi ne estis publikigita). Tre interesa estas ĉina ekonomia kaj politika formulo: du ekonomiaj sistemoj en unu lando. Mi esperas, ke la Ĉina Popola Respubliko ne forlasos socialismon kaj ne revenos al kapitalismo kiel tio okazis en multaj orienteŭropaj landoj, kie nun la granda plimulto de la popoloj vivas ekonomie pli malbone ol en la socialisma socio. Al ses respublikoj



konsistigantaj la eksan Jugoslavion la reveno al kapitalismo alportis ne nur ekonomian regreson, sed ankaŭ militajn kruelojn post 45 jaroj. Pro pli rapida ekonomia progreso en la 21-a jarcento Ĉinio

fariĝos pli potenca lando, kiu povus ankaŭ multe helpi por disvastigi la internacian lingvon Esperanto ne nur en Azio, sed ankaŭ tutmonde.

Mi nun kiel 75-jarulo diras:

Mi estas feliĉa, ke mi sufiĉe frue en mia vivo eksciis kaj ellernis Esperanton kaj ke mi multe utiligis kaj utiligas ĝin restante fidela al la Zamenhofa humana ideo. ■

# Kiel mi kreskis kun “El Popola Ĉinio”

de DRAHOMIR KOČVARA (Ĉeĥio)

**M**I fariĝis esperantisto fakte en 1950, kiam mi sukcesis ĉe ekzameno pri kapablo instrui Esperanton. Kvankam mi komencis studi Esperanton jam en 1947, tamen tio estis nur epoko instrua kaj studa, kiam mi ne komprenis kian signifon havus nia lingvo, kia ĝi estus enkondukita en la tuta mondo.

Tiam mi decidis aboni iun gazeton ekstereŭropan. En Heroldo de Esperanto, kiun mi jam abonis, mi eksciis pri naskiĝanta EPCĉ, kaj senhezite mi abonis ĝin. Laŭ aspekto ĝi tiam estis tre modesta, sed laŭ enhavo ĝi estis por eŭropanoj tre alloga, riĉenhava kaj bone informanta pri ĉiuj sferoj de vivo en Ĉinio.

Agrabla surprizo okazis ĉiam antaŭ nova jaro, kiam abonantoj ricevadis belegajn kalendarojn, kiuj estis propagandiloj ne nur de Ĉinio, sed ankaŭ de nia movado. Kalendaroj propagandis dum tuta jaro. Ankoraŭ pli efika propagando estis tiuj dissendataj paperaj eltondaĵoj mane faritaj. Tio estis propagando daŭra, ĉar multaj s-anoj kadrigis ilin por daŭra ornamo de loĝejo. Vizitantoj en nia loĝejo ĉiam demandas, de kie ni gajnis tian fajnaĵon de orienta arto.

EPCĉ evoluis el griza kolombo al multkolora fiero pavo. Hodiaŭ mi devas konstati, ke ĝi estas la



La aŭtoro

plej bela Esperanta gazeto en la mondo. Ĉiu povas en ĝi trovi, pro ĝia enhava bunteco, artikolojn laŭ propra intereso. Min ĉiam ravis artikoloj pri protekto de homa sano kaj pri kuracaj metodoj, kiuj havas miljaran tradicion. Avidas mi ĉiam legis ilin kaj inter amikoj mi rakontis pri ĝia principo. Akupunkturo estas apenaŭ konata kuracmetodo kaj mi opinias, ke estas granda merito de EPCĉ, ke ĝi nuntempe estas ofte uzata en Eŭropo. Mi memoras, ke pri artikoloj, kiuj vekis intereson en eksterlando, estis eldonataj apartaj broŝuroj. Tiu fakto instigis min, ke mi komencis tradukadi ilin por nia faka preso pri homa sano. Hodiaŭ, kiam mi estas en movado, mi devas konfesi, ke tiu tradukado

tre helpis al mia lingva perfektigo kaj devigis min studi Esperanton pli profunde. Mi povas diri, ke dank' al EPCĉ mi transformiĝis. El simpla esperantisto mi fariĝis batalanto por venko de nia ideo, ke ĉiu homo en la mondo sciu por internacia interkomprenigo la internacian lingvon Esperanto. Mi jam nun povas imagi la estontan mondon, kie radio kaj televidelsendoj parolos en Esperanto, kompreneblaj por la tuta homaro. Gazetaro de la tuta mondo estos komprenebla por ĉiuj. Ne ekzistos plu en internaciaj konferencoj interpretistoj. Filmoj kaj teatraĵoj povas esti ludataj por la tuta mondo, sen lingva baro. Elstara literaturo kaj poezio estos presataj por bezono de la tuta mondo. Edukado de junularo faros fantazian salton antaŭen. Studado ne plu estos barita per lingva baro. Ĉiu povas studi kie ajn en la mondo. Dank' al la komuna lingvo la homaro estos pli edukita. Signifaj eltrovoj havos facilan vojon por esti rapide enkondukitaj kaj uzataj.

Sonĝo de nia majstro Dr. Zamenhof en proksimaj jaroj realiĝos. EPCĉ havas je tiu venko propran meriton. Mi estas feliĉa, ke mi restis dum tuta 50-jara epoko fidela leganto de EPCĉ. Tiu luksa gazeto rekompencis min per pliperfektigo. Mi estas dankema al ĉiuj, kiuj preparas ĝin. Mi deziras al la redakcio kaj al ĉiuj legantoj, ke en pluaj jaroj ili sukcese fosu sian sulkon. ■

# EPĈ kaj mi



de SZENTGYÖRGYI ZOLTAN (Hungario)

**K**IAM mi en 1985 komencis aboni EPĈ-n, mi ne pensis, ke mi abonadas ĝin ĝis miaj cirkonstancoj permesas. Mi post 180 ekzempleroj kun ĝojo kaj kun kvietaj konsciencoj povas diri, ke mi decidis ĝuste, kiam mi komencis aboni EPĈ-n.

Antaŭ EPĈ-legado mi sciis malmulte kaj malprave pri la ĉina popolo kaj pri Ĉinio. Mi volis ekkoni Ĉinion, kaj al tio EPĈ donis bonegan kaj perfektan helpon.

La unua ekzemplero post mia abono prezentas al mi bildojn pri Tibeto. En esplanado estas ora cervo, kaj en fono la majesta Potala-palaco inter tero kaj ĉielo. La bildo memorigis min al la mirakla cervo el hungara legendo, kaj la palaco al Sandor Korosi Csoma, kiu eliris el Transilvanio al Tibeto kaj fariĝis mondfama tibetologo kaj lingvisto. Tio vekis en mi personan simpatian kaj pli grandan intereson al la revuo kaj al Ĉinio.

Mi bedaŭras, ke mi ne de la unua numero abonis la revuon, ĉar baze de dekkvin-jara abonado mi asertas, ke EPĈ sisteme, varie, facile kompreneble kaj multkolora prezentis la 5 000-jaran historion de Ĉinio kaj prezentas la antikvan, nunan kaj estontan Ĉinion. ■

## E-ekspozicio por infanoj en Nankino

En la unua Internacia Infana Tago de la nova jarmilo, la Unua E-ekspozicio por Infanoj okazis en la elementa lernejo Fuzimiao (la nomo signifas Konfucean Templon), Nankino. Pli ol 1 500 instruistoj kaj lernantoj vizitis la ekspozicion kun diversaj E-filatelaĵoj, aŭdo-vidaj instruaj materialoj kaj infanaj E-libroj, kiuj kondukis la infanojn en novan mondon kaj konigis al ili Esperanton.

La ekspozicion okazigis Zhuang Rui, 8-jara lernanto de la dua klaso de la nomita lernejo, kaj lia patro Zhuang Qixiong. La knabo eklernis Esperanton de la patro du jarojn antaŭe kaj havas nun korespondajn amikojn de pluraj landoj. Por ke la kunlernantoj konu Esperanton, li mem faris afiŝojn kaj aranĝis



Zhuang Rui (la tria de dekstre) kaj liaj kunlernantoj

la ekspozicion. Li skribis en la taglibro: "Antaŭe mi ĉiam festis la datrevenon de mia naskiĝo per frandaĵoj, sed ĉi-jare mi faras signifoplenan aferon — okazigi kune kun la patro E-ekspozicion, esperante, ke pli da kunlernantoj amikiĝos per Esperanto kun alilandaj infanoj." Ilia dua ekspozicio okazos venontjare en la Nankina Fremdlingva Lernejo.

(Wang Hanping)

# Indiferentaj herboj

de HE HUAIHONG

**E**STIS fablo: Iun tagon reĝo estis promenanta en sia ĝardeno kaj miris, ke ĉiuj floroj, herboj kaj arboj en la ĝardeno velkis. Poste la reĝo informiĝis, ke la kverkoj sin mortigis, ĉar ili hontis komparante sin kun la pinoj, ke ili estis malpli altaj ol la pinoj. Poste ankaŭ la pinoj mortis pro tio, ke ili ne povis doni tiom multe da fruktoj kiel vinberujoj. Kaj sekvis la morto de la vinberujoj, kiuj bedaŭris, ke ili ne povas stari nek doni belajn florojn kiel persikarboj. La konvolvuloj malsaniĝis, ke ili ne estas aromaj kiel siringoj. Kaj preskaŭ ĉiuj aliaj kreskaĵoj falis en deprimiĝon, escepte de malgrandaj indiferentaj herboj.

La reĝo demandis: "Ho, malgrandaj indiferentaj herboj, ĉiuj aliaj vegetaloj velkis, sed nur vi tenas vin ne deprimiĝe. Kial?"

Respondis la malgrandaj herboj: "Via reĝa moŝto, ni neniam deprimiĝas, ĉar ni scias, ke vi ordonos al la ĝardenistoj planti, se vi volas havi kverkon, pinon, persikarbon ks. Sed ni bone scias, ke vi volas nur, ke ni estu indiferentaj herboj."

Tio estas kortuŝa fablo. Ĉu ni supozu la daŭrigon de la

fablo?

Ni imagu, ke la reĝo estis kortuŝita de la herbetoj. Li diris al ili: "Antaŭe vi estis la plej indiferentaj en la ĝardeno, kaj nun mi faru vin la plej okulfrapaj. Ne, mi ne lasu la ĝardenistojn prizorgi aliajn florojn kaj arbojn, sed ekskluzive flegi vin per sufiĉe da akvo kaj nutraĵo."

Kaj en la ĝardeno de la reĝo kreskis nur la indiferentaj herboj, ke la pejzaĝo tie fariĝis monotona. Sed aperis strangaĵo: la indiferentaj herboj fariĝis ne kontentaj kaj deziris pli kaj pli multe. Ili petis pli da prizorgo kaj pli da nutraĵo opiniante, ke tiel ili fariĝos altaj kiel pino, fruktodonemaj kiel vinberujo, belaj kiel persikfloro kaj aromaj

kiel siringo. Sed ilia deziro estis nerealigebla, kaj ili ĉagreniĝis, plendadis kaj iom post iom velkis.

Pli malbone estis, ke ili fariĝis pli kaj pli malakordiĝemaj kun aliaj floroj kaj herboj. Kiam vento aŭ birdoj alportis semojn de alispeculoj, la indiferentaj herboj ilin kalumniis kaj atakis, opiniante, ke ili ne estas belaj. Ili eĉ petis la ĝardenistojn forigi tiujn florojn kaj herbojn. Pli poste, la indiferentaj herboj malamikiĝis inter si.

Kiam la reĝo refoje venis al la ĝardeno, li trovis, ke ĝi jam fariĝis sovaĝejo.

Feliĉe, tio estas nur imagoj. Se niaj ŝatataj indiferentaj herboj ne plu estus postulemaj, ilia epiteto devus esti ŝanĝita. ■





## ĈINIO

● Okaze de la 113-a datreveno de la apero de la Unua Libro de Esperanto, la Esperanta Centro por Infanoj de la Jiangsu-a E-Asocio okazigis la 14-an de julio la ceremonion de sia fondiĝo en la elementa lernejo Hengxing en la urbo Yancheng, Jiangsu-provinco. En la sama tago lokaj e-istoj faris surstrate propagandon kaj konsultiĝon pri Esperanto. E-kurso funkcias en la nomita lernejo, kies estro estas e-isto Li Wenxian. Se vi volas kontaktiĝi kun ili, skribu al: Yao Kaishen, 23 Huancheng Beilu, Yancheng, Ĉinio 224001 aŭ rete al Cui Jianhua: cuijh@nju.edu.cn

## BULGARIO

● Inter la 1-a kaj la 8-a de septembro 2000 okazos TEJO-trejnseminario en Varna, Bulgario, pri la temo: "Balkana junulara kunlaboro por kulturo de paco", aparte aktuala sur Balkanoj. Kadre de la seminario okazos trejnadoj en diversaj formoj: prelegoj, vizitoj, laborgrupoj kaj diskutrondoj. Samtempe 10-15 komencantoj partoprenos Esperanto-kurson. Pliaj informoj: Lokaj organizantoj: Sabira Ståhlberg kaj Aleksandar Shivarov, p.k. 405, BG-9000 Varna, Bulgario. tel.: +359-52-246 941; fakso: +359-52-246 326; retpoŝto: <kontakto@esperanto.org>; <a\_shivarov@mailroom.com> (Ret-info)

## MADAGASKARO

● Universala Kultura Servo havas siajn retpoŝton kaj hejmpaĝojn: <uks@dts.mg>; <http://takelaka.dts.mg/uks> (Eugene Raveloson)

## HISPANIO

● La 2-an de marto, la televida kanalo 54-a de la regiono de



Esperanta kurso en televido de Hispanio

Katalunujo, Baix Llobregat kaj L'Hospitalet (apud Barcelono) komencis elsendadon de Esperanto-kurso. Tiu ĉi kurso okazas ĵaŭde ĉiun duan semajnon. (Marti Guerrero i Cots)

## POLLANDO

● La 7-an de majo 2000 finiĝis la jubileaj 25-aj Esperantaj Tagoj de Bydgoszcz, kiujn partoprenis preskaŭ 150 gastoj el 16 landoj. La ĉefa organizanto de la aranĝo estis la Internacia Asocio "Monda Turismo", kiu fondiĝis antaŭ 30 jaroj, kaj kies centra sidejo ekde la jaro 1990 troviĝas ĝuste en la urbo Bydgoszcz. Inter la 29-a de aprilo kaj la 7-a de majo okazis tie pli ol 30 kursoj, seminarioj, prelegserioj kaj aliaj programeroj. Dum 1-3 majo kunsidis la Estraro kaj Revizoroj de "Monda Turismo", kaj la 3-an de majo, okaze de Pola Festo de Konstitucio, en la Palaco de Junularo okazis Pola Vespero, dum kiu la gastoj rigardis sep folklorensemblojn el la regiono de Kujavio kaj Pomerelio.

La Internacia Asocio "Monda Turismo" elkore invitas vin partopreni la tradician 26-an Internacian Forumon pri Turismo, Edukado kaj Kulturo okaze de la Monda Tago de Turismo (27-a de septembro). La ĉi-jara Forumo, same

kiel la antaŭaj, konsistos el du ĉefaj partoj: labora (23-27-a de septembro) kaj eduka (26-a de septembro — 1-a de oktobro). Kadre de la Forumo okazos ankaŭ la 18-a Pola Studadsesio de AIS. La tutan Forumon eblas partopreni, paginte 100 USD por loĝado kaj manĝoj kaj 100 USD por la programo.

Se vi povas aŭ volas ĉeesti nur la laboran parton, aŭ nur la edukan parton, vi povas pagi duonon — do 50 USD por loĝado-manĝado kaj 50 USD por programo; aliĝos ĝis la 1-a de septembro. Adr.: Monda Turismo, Asocio por Faciligo de la Internacia Turismo per Aplikado de Esperanto, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL 85-094 Bydgoszcz, Pollando. Tel. kaj fakso: (48-52) 341-57-44, 346-00-82. (Monda Turismo)

● La 30-a Tutpollanda Kongreso de Esperantistoj okazis en Krakovo de 28. 04 ĝis 03. 05. 2000. En la kongreso partoprenis pli ol 70 geesperantistoj el Pollando kaj ankaŭ gastoj el Francio, Ukrainio, Rusio, Anglio, Italio, Slovakio kaj Hungario. Riĉa programo kaj bela vetero ege ĝojigis ge-partoprenantojn. Krakova Societo Esperanto, Esperanto Klubo de UNESKO en Krakovo kaj Pola Esperanto-Asocio organizis la kongreson.

(Andrzej Sochacki)



Kantas Koruso "Kamea".

# Historiaj signoj (II)

Tie oni elterigis multajn laborilojn, ĉiutagajn uzajojn, ornamaĵojn, bone konservatajn lignajn dom-restaĵojn kaj lignan puton en groteska formo. Kaj la eltrovo de 120 tunoj da kultivita rizo faris sensacion inter la fakuloj de la mondo.

de PING HUA


## HAN-DINASTIA TOMBO MAWANGDUI: KADAVRO ANTAŬ 2 000 JAROJ

Ĉe Mawangdui en la orienta antaŭurbo de Changsha, ĉefurbo


de Hunan-provinco, Ĉinio, troviĝas du teramasoj altaj ĉ. 17 m., unu oriente kaj la alia okcidente. Laŭdire la loko estas tombejo de la familio de Ma Yi, estro de Chu-regno en la Kvin Dinastioj (907-960). Vintre de 1971, konstruistoj malkovris tie tombon de Han-dinastio.

El la miloj da historiaj objektoj malkovritaj en la tri

tombokavoj de Mawangdui tre famas la silkaĵoj kaj bambuaj slipoj kun skribaĵoj kaj T-forma silkaĵo kun simetrie farita flulinia pentraĵo en buntaj koloroj. La maldika robo longa je 160 cm. kaj peza je nur 48 g. estas tre rara trezoro. Sed la plej atentaltira estas la kadavro de virino antaŭ 2 000 jaroj tre bone konservata. La haŭto kaj haroj



Argilaj militistoj kaj ĉevaloj en la kavo n-ro 1



Bronzaj ĉevaloj kaj ĉaro

estas sendifektaj, la fingroj — klaraj je spiralaj kaneloj kaj la subhaŭta graso — dika. Kiam oni injektis al ĝi antiseptojn, la histo restas ankoraŭ elasta kaj la artikoj de la kvar membroj — moveblaj. En la stomako troviĝas 138 melonsemoj. Tre simila al la freŝa, ĝi estas malseka kadavro, tute diferenca de mumio, de seka aŭ ledeca kadavro. Tio estas ege rara en la notoj pri antikvaj kadavroj en la mondo. En majo 1972 oni unuafoje ekspoziciis la kadavron en la Hunan-a Muzeo. Ĉiutage 10 000 homoj vizitis la muzeon kaj foje 14 000, eĉ la vitra pordego de la muzeo estis disrompita pro interpuŝiĝado de vizitantoj.

## HEMUDU: ANTIKVA RIZ-KULTURA VILAĜO

La vilaĝo Hemudu troviĝas en Yuyao-gubernio, Zhejiang-provinco. En junio 1973 oni malkovris tie, dum konstruado de hidroelektrejo, arojn da tre malofte videblaj nigraj fajencaj pecoj, lignajn dom-restaĵojn kaj ostojn de antikvaj bestoj. Konstatinte, ke ili estas historiaj objektoj apartenantaj al neolitiko, oni komencis la prifosadon por protekti la ruinojn.

La ruino kun areo de pli ol 40 000 kvadrataj metroj prezentas la kulturon de kvar antaŭhistoriaj periodoj. Ĝia plej antikva tavolo datiĝis antaŭ pli ol 7 000 jaroj.


Tie oni elterigis multajn laborilojn, ĉiutagajn uzaĵojn, ornamaĵojn, bone konservatajn lignajn dom-restaĵojn kaj lignan puton en groteska formo. Kaj la eltrovo de 120 tunoj da kultivita rizo faris sensacion inter la fakuloj de la mondo. Krome, en la ruino oni malkovris ankaŭ restaĵojn de

natura lako plej frue uzata kaj tiujn de porkoj kaj bubaloj plej frue bredataj en Ĉinio aŭ en la mondo.

La malkovro de la ruino Hemudu nekontesteble pruvas, ke antaŭ 7 000 jaroj ekzistis jam altrada kulturo en la baseno de Yangzi-rivero.

## ARGILAJ MILITISTOJ KAJ ĈEVALOJ: GWARDIO DE LA UNUA IMPERIESTRO DE QIN-DINASTIO

Norde de Lishan-monto en Lintong, Shaanxi-provinco, imponas la Maŭzoleo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio (221-206 a. K.). La mondfamaj argilaj militistoj kaj ĉevaloj troviĝas norde de la vojo al la orienta





pordego de la maŭzoleo.

En marto 1974, kiam loka kamparano fosis puton, li trovis rompitaĵajn argilajn homajn kapojn, korpojn kaj manojn en grandeco de tiuj de homoj. Do, ekis la prifosado de la "Oka Miraklo de la Mondo". Nun jam finiĝis la reordigado de la kavoj n-roj 1, 2 kaj 3 kun argilaj militistoj kaj ĉevaloj, kaj daŭras la ĝenerala prifosado.

La argilaj militistoj kaj ĉevaloj distingiĝas per siaj grandeco, multeco kaj vereco. Ili, ege ver-similaj, estas tiel grandaj kiel veraj homoj kaj ĉevaloj. En unu kavoj troviĝas argilaj militistoj kaj ĉevaloj, kiuj formas grandan formacion. Post esploro oni konstatis, ke en la kavoj estas 8 000 argilaj militistoj, 600 argilaj ĉevaloj, 125 lignaj ĉaroj kaj pli ol 39 000 diversaj bronzaĵoj. En la kavoj de kun-




Forno kaj vaporumilo malkovritaj en Hemudu

entombigitaĵoj okcidente de la maŭzoleo troviĝas du bronzaĵaj ĉevalĉaroj. Fakuloj diris, ke la argilaj militistoj kaj ĉevaloj antaŭe estis koloraj. En 1999, dank' al la avangarda tekniko, arkeologoj finfine sukcesis konservi la kolorojn de la argilaj militistoj kaj ĉevaloj, ke ili bunte reaperis en la mondo kun sia origina aspekto.

## GAMO-SONORILARO: ATESTO DE LA KULTURO DE RITA MUZIKO

En septembro 1977 oni malkovris dum konstruado argilaĵojn kaj ŝtonplatojn ĉe Leigudun tri kilometrojn nordokcidente de la gubernia urbo de Suixian, Hubei-provinco. En marto 1978 oni konstatis, ke la loko estas granda antikva tombejo, kiu areo 220 kvadratajn metrojn kaj kies lignaj ĉerkoj okupas pli ol 4/5 de la areo. Tio estas la unua fojo por Ĉinio, malkovri tiel grandan tombejon el lignaj ĉerkoj. En la tombo, bone konservata, ripozas markizo Zeng, kun pli ol 7 000 kunentombigitaĵoj, inkl. de raraj bronzaĵoj, antikvaj bataliloj, ĉeval-



Gamo-sonorilaro

ĉaroj, elegantaj oraĵoj, jadaĵoj, lakitaj lignaĵoj kaj bambuaj slipoj kun skribaĵoj.

El tiuj elterigitaj historiaj objektoj la plej atento-altiraj estas 124 elegantaj muzikiloj, inkl. de gamo-sonorilaro, gamo-tintilaro, tamburoj, blovinstrumentoj, kordmuzikiloj, pajnoŝalmoj, bambuaj flutoj k.a., el kiuj la plej imponaj estas bronza gamo-sonorilaro el 65 sonoriloj pendantaj laŭvice de la gamoj, en ok grupoj sur trietaĝa framo longa je 7.48 m., larĝa je 3.35 m. kaj alta je 2.73 m., firme staranta pli ol 2 400 jarojn kun ŝarĝo de pli ol 2 500 kg. La gamo-sonorilaro, tre bone konservata, donas agrablajn sonojn. La provludo pruvis, ke ĝiaj akorda, polifonia kaj aliaj rimedoj estas bone uzataj. Tio neis la malnovan diron, ke la sep ĉinaj muziknotoj originis de Eŭropo. Kun la teknologia supereco la gamo-sonorilaro estas senprecedenca miraklo en la muzika historio de Ĉinio.


## FAMEN-TEMPLO: FINGRA RESTAĴO DE ŜAKJAMUNIO

Famen-templo, fama antikva templo de Ĉinio, situas en la urbeto Famen 10 km. norde de la gubernio Fufeng, Shaanxi-provinco. La pagodo de la templo estis konstruita en 601. Ĝi, farita

el ligno, servis kiel relikvostupao. En 1567 ĝi detruigis kaj en 1573 oni rekonstruis ĝin kiel 13-etaĝan kaj ok-angulan pagodon el brikoj. En aŭgusto 1981 ĝi disfalis pro senĉesa pluvego. Por rekonstrui ĝin, arkeologoj prifosis ĝian ruinon en 1987 kaj 1988. Intertempe oni malkovris ĝian subteran palacon plenan de raraj trezoroj.

La subtera palaco sin kaŝas meze de la bazo de la pagodo en formo 甲, longa je 21.12 m. kaj alta je 1.87 m. La historiaj objektoj en ĝi povas esti dividitaj en du partojn: A. kvar altvaloraj trezoroj de budhismo — fingraj restaĵoj de Ŝakjamunio; B. pli ol 170 objektoj uzataj por kultu liajn restaĵojn. Ili, multnombraj kaj altgradaj, montris la plej altan teknologian nivelon de tiu periodo. El ili la plej valora estas statuo de bodisatvo alta je 38.5 cm. kaj peza je 1 926 g. Ĝi estas atesto de la lasta bonvenigo de liaj restaĵoj en Tang-dinastio (618-907) kaj unika historia objekto kun imperiestra nomo.

Krome, dekkelkaj porcelanaĵoj konservataj en la subtera palaco de Famen-templo solvis la enigmon de porcelanaĵo kun sekreta koloro (tia porcelanaĵo estis disponata nur de imperiestra familio). Kaj granda kvanto da delikataj teksaĵoj eltrovitaj en ĝi reflektis la plej altan nivelon de la teksa tekniko kaj arto de Tang-dinastio. ■




Ostaj iloj malkovritaj en Hemudu

La virina kadavro antaŭ 2 000 jaroj





Fajencaĵo malkovrita en Hemudu



Porcelanaĵo kun sekreta koloro



T-forma silkajo kun simetrie farita bildo





# Antikva muziko de naŝi-oj – konversacio kun dioj

Antaŭe la antikva muziko de naŝi-oj estis ludata nur en la Printempa Festo, same kiel la novjara koncerto en la Ora Halo de Vieno. Fakte la antikva muziko de naŝi-oj estis longhistoria religia muziko origininta en la mezo de Ĉinio, kie prosperis la kulturo.

---

de ZHANG XUEYING

---

**L**A koncerto de la antikva muziko de naŝi-oj sin lokis en antikva korto de lokano, kies areo egalas al la ludkampo de korbopilko. La scenejo, kiu okupas duonon de la korto, estis kloŝita de ruĝa koloro: freŝruĝaj kurtenoj, ruĝaj pendaĵoj kun versparaj kaligrafiaĵoj, antikvastilaj rekvizitoj malhelruĝe lakitaj... Prilumate de oranĝkoloraj lampoj, mistereco kaj antikveco regis la korton. Sur la tero de la korto sternaĝis dika tavolo da pinaj branĉaĵoj, kaj la agrabla aromo de pino saturis la korton. Oni diris, ke tia aranĝo estas la plej alta soleno por la ludado de la antikva muziko de naŝi-oj.

Antaŭe la antikva muziko de naŝi-oj estis ludata nur en la Printempa Festo, same kiel la novjara koncerto en la Ora Halo de Vieno. Fakte

la antikva muziko de naŝi-oj estis longhistoria religia muziko origininta en la mezo de Ĉinio, kie prosperis la kulturo. En la 3-a jarcento, fama ĉina strategiisto kaj muzikisto Zhuge Liang vivis longan tempon en la naŝi-a loko en Lijiang-gubernio en la limregiono de la sudokcidenta provinco Yunnan, kie dense loĝas naŝi-oj. Oni kredis, ke Zhuge Liang enkondukis la muzikon de meza Ĉinio ĉi tien. Sed muzikisto s-ro Xuan Ke, tre fama en la loko, asertis post esploro, ke la antikva muziko de naŝi-oj originis de la religia kaj palaca muzikoj de la dinastioj Tang (618-907) kaj Song (960-1279). Tiu periodo estis la plej brila pro la impono de la kulturo kaj multnombreco de famaj verkistoj kaj poetoj. Dum alia opinio estas, ke la antikva muziko de naŝi-oj estis alportita de la migrintoj el la mezo de Ĉinio al Yunnan, kiuj fuĝis de milita tumulto. Malgraŭ la malsamaj asertoj, la antikva muziko



de naŝi-oj estas fidele heredita kaj oni povas ĝui tiun muzikon nomatan kiel "viva fosilio".

La 30 membroj de la orkestro portas sur si antikvajn ĉinajn vestojn kaj havas longan barbon. Kiam la muzikistoj malrapide iras sur la scenejon, la aŭskultantoj sentas antikvecon kaj delikatecon. Eble la meznombra aĝo de tiu orkestro estas la plej granda inter tiuj de la orkestroj de la mondo. Du trionoj de la membroj aĝas pli ol 65 jarojn, kaj 7 el ili — pli ol 80 jarojn. La plej aĝa el ili estas 89-jara, por kiu ludo de la antikva muziko estas granda plezuro. En la orkestro estas ankaŭ 3 junaj kantistinoj.

La orkestro uzas antikvajn popolajn muzikilojn de Ĉinio, ekzemple bambua fluto, antikva kordinstrumento *Zheng*, trikordulo, cimbalo kaj tamburo.

La ludado komenciĝas per urĝa tamburado, kaj ĉiu muzikopeco estas estrata de fluto. Rusa turisto tiele priskribis la muzikoludon: "La muziko aŭdiĝas per neimageble bela melodio, kvazaŭ akva kurteno falinta de sur jada ekrano; kiam la muziko malproksimiĝas kune kun la tintado de malgrandaj sonoriletoj, ŝajnas, ke gemoj falas en akvon kaj estigas ondetojn..." En la fino kantistinoj ekkantas per sia natura voĉo, kaj la bela muziko soras rekte sur la ĉielon.

Dum ludado kaj la aŭskultantoj kaj la ludantoj estas tre piaj. Naŝi-oj admiras la antikvan muzikon same kiel Vienanoj Strauss Johann. Ili prenas la antikvan muzikon kiel rimedon por interkomuniki kun la dioj sur la ĉielo, kaj kiam ili ludas la muzikon, ili kredas, ke dioj sur la ĉielo estas absorbite aŭskultas la ludon.

Prapatroj de naŝi-oj kredis je dio kaj kreis primitivan ŝamanan politeismon "Dongba". En la naŝi-a lingvo "dongba" signifas "homon multscian kaj saĝan". Poste "dongba" fariĝis sinonimo de pastro. Dum sakramento la religianoj ne nur kultas diojn per muziko, sed ankaŭ legas "Dongbaan sutron" notitan per antikva hieroglifo. La hieroglifo, "Dongbaa sutro", kulta kanto kaj danco, sakramento kaj la beletro rilatanta kun la religio konsistigas la nacian kulturon — la Dongbaan kulturon misteran kaj originalan.

En la pasinteco la ludantoj de la muziko devis esti renomaj homoj de la loko. En Lijiang, kompetenteco en ludo de tiu muziko estis nepre necesa kvalifikiteco por la viroj de la bonhavaj familioj, kiuj volis fariĝi erudiciuloj aŭ membroj de la tiea mondumo.

Nun la antikva muziko frontas embarason de manko de daŭrigantoj, ĉar ĝiaj interesatoj ĉefe estas maljunuloj kaj fremdlandaj turistoj, dum la junuloj estas forlogitaj de popmuziko. Ĉiujare mortas membroj de la orkestro, sed ilia arto ne trovas heredanton. Kaj krome la orkestro estas embarasita ankaŭ de financa malfacilo. ■









# Vestoj de blang-oj

Teksto kaj fotoj de LIU SIGONG

La totala nombro de blang-oj estas ĉ. 85 000. Ili loĝas ĉefe en Xishuangbanna, Yunnan-provinco, sudokcidenta Ĉinio. Taj-oj estas iliaj intimaj najbaroj. Tial la domoj kaj vestoj de blang-oj estas

similaj al tiuj de taj-oj.


La blang-aj viroj portas senkoluman veston, nigran lozan pantalonon kaj nigran aŭ blankan kaptukon; la virinoj portas koloran senkoluman veston, tubojupon kun ruĝaj-verdaj aŭ nigraj strioj kaj grandan kaptukon sur volvita

hararo. En grava kunveno aŭ festo la virinoj metas florojn de diversaj koloroj sur la kaptukon. En la Akvoverŝa Festo oni juĝas virinan kapornamon. Elstaraj estas tiuj, kiuj portas plej valorajn florojn bone aranĝitajn. Tial la blang-oj ege zorgas pri kapornamo.

Por renkontiĝo la knabinoj faras ornamadon.



En geedziĝa ceremonio



Flustro

Maljunulino en nacia vesto



Reveno de flor-kolektado







Kapornamo de mezaĝa virino



Knabino kun floroj sur la kapo



Gejunuloj kantantaj amkanton





# Mia Esperanta ĝardeno



de CONTI GIOVANNI (Italio)

Miaj amikoj diras, ke mi konstruis la plej strangan, sed belan Esperantan ĝardenon.

Fakte en mia ĝardeno mi metis dumotoran aviadilon "Piper" kun Esperanta stelo sur la vosto kaj la skribaĵo "L. Zamenhof" sur la nacelo.

Mi ankaŭ konstruis terglobon el ligno, altan 2 metrojn, kiu turniĝas ĉirkaŭ si mem: ĝi faras unu turniĝon ĉiun minuton.

Sur tiu terglobo mi desegnis kaj pentris ĉiujn kontinentojn de la mondo kun la montaroj en reliefo, la ĉefajn riverojn kaj urbojn, ĉiujn

insulojn, ankaŭ la multenombrajn de la Pacifika Oceano.

Kompreneble ĉion en la Esperanta lingvo!

Mi lokis tiun terglobon en kiosketo, sur kies supro situas Esperanta flago, kiu signas la direkton de la vento, sube estas 4 aerometroj kun alterniĝantaj padeloj, kiuj turniĝas du dekstren kaj du maldekstren.

En mia ĝardeno estas ankaŭ lageto kun insulo,

monteto kaj iuj padoj kaj padetoj, por kiuj mi faris stratindikilojn, dediĉitaj al la ĉefaj eminentuloj de Esperanto.

Mi faris ankaŭ multajn aliajn aferojn en mia ĝardeno, kompreneble ĉiam en Esperanto, kaj pro tio miaj amikoj diras, ke mi estas...

Esperantomalsanulo!





# Familioj en groto

La loĝantoj de la groto estas fore de brua urbo kaj moderna vivo. Ili vivas vivon pacan, kvietan kaj senzorgan.

Teksto de CHEN XIAOHONG

Fotoj de GAO BING

**Ĉ**E tagiĝo la unua kokeriko sonas kaj eĥiĝas en la tuta groto. Sekvas kantado de aliaj kokoj. Vekiĝas ĉiuj vivuloj el sia sonĝo — venas nova tago.

Tiu groto estas loĝejo de homoj de Gejing-vilaĝo, Shuitang-urbeto de Zijun-gubernio, suda Guizhou-provinco. 21 familioj kun pli ol 80 anoj loĝas en la groto granda kiel piedpilkludejo. Wang Fengguang, kiu plej frue ekloĝis en la groto, konigis al ni, ke la groto konsistas el tri kavernoj supre kaj malsupre interkomunikigantaj. Antaŭe lia familio loĝis en la malsupra kaverno kaj poste transloĝiĝis al la meza, kaj tie ili vivis jam pli ol 40 jarojn.

La meza kaverno altas ĉirkaŭ 60 m, kaj la enirejo larĝas preskaŭ 100 m. La groto estas tipe karsta. Antaŭ la groto prosperas sovaĝaj bambuoj, kiuj ombas la enirejon de la groto tiel dense, ke estas neimageble, ke tie loĝas dekoj da familioj.

Pro tio, ke la groto havas grandan enirejon, ĝi estas hela kaj bone aerumita, varma en vintro kaj malvarmeta en somero. La domo en la groto konstruiĝas sur lignaj fostoj, kun muroj el bambua plektbarilo. Ĝenerale oni faras tegmenton el bambuaj pecoj, sur kiuj oni povas sekigi grenon kaj pajlon. Familio kun multaj anoj uzas ĝin kiel liton kaj metas sur ĝin diversajn objektojn.

Ĉar tiu loko estas karsta regiono, tial mankas kampoj:

rokfendoj do estas utiligataj por semado. Eĉ malgranda parcelo da kampo estas bona por kulturi maizon. El bambuaj pecoj ili faras plektaĵojn sur deklivo por aerumi grenojn. Al la karsta regiono mankas surtera akvo, sed fakte ĝia subtera akvo riĉas — akvo en la groto tik-takas guto post guto, per bambua tubo oni kondukas ĝin en basenon por konservo. La klara kaj dolĉa fontakvo estas natura minerala akvo. Se ne pluvos, oni devas iri pli ol mil metrojn por preni akvon. Tial oni kulturas kserofitojn: maizo, batato, terpomo k.s.

Pro maloportuna trafiko vizitado de lernejo estas malfacila por geknaboj. Oni bone scias, ke nur scioj donas bonajn ŝancojn. Por homoj ne multe klerigitaj estas malfacile serĉi laboron. Tial Wang Fengguang volis ĉiamaniere klopodi, por ke la filino vizitu lernejon, ankaŭ la aliaj vilaĝanoj tiel pensis. Antaŭe la vilaĝanoj elektis la plej bonan ŝtonan domon en la groto kiel lernejon kaj invitis instruiston el la loko dekojn da km fore, sed pro la malproksimeco finfine li forlasis la laboron antaŭ du jaroj. Do geknaboj de la vilaĝo devas viziti lernejon de alia vilaĝo. La 14-jara filino de Wang, sesaklasa lernantino, devas piediri 2 horojn al la lernejo. Ŝi estas bona lernantino. La muroj de ŝia ĉambro estas plenaj de ŝiaj honoratestoj. Ŝi deziras fariĝi instruistino kaj starigi lernejon en la groto, por ke la geknaboj havu multajn sciojn kaj fariĝu kleraj homoj.

La loĝantoj de la groto estas

fore de brua urbo kaj moderna vivo. Ili vivas vivon pacan, kvietan kaj senzorgan. Ili havas kapablon sin adapti al la naturo. Hodiaŭ ili ankoraŭ uzas primitivan lignan teksilon. En la morta sezono de kamplaboro virinoj manipulas la teksilon por fari novjaran veston por siaj gefiloj aŭ veston por la edziniĝonto. Viroj en tiu tempo faras vinon: ili metas 10 kg da sorgo en poton, kuiras kaj fermentigas ĝin. Tia sorga vino estas bongusta, kaj ĝia bonodoro ŝvebas en la groto kaj tiklas la nazon de ĉiuj.

Ĉe la enirejo de la groto, kiun sunlumo povas atingi, troviĝas ujoj en formo de barelo. Ili du finoj estas fermitaj, kun trueto. Ili estas uzataj por bredi abelojn. Ĉe tagiĝo la abeloj flugas el la ujoj por kolekti nektaron kaj en nokto kaj pluva tago ili faras mielon en la ujoj. La mielo estas preferindaĵo por festo kaj toniko por la infanoj.

En la komenco de la 80-aj jaroj la registaro intencis, ke la vilaĝanoj transloĝiĝu el la groto. Ĝi invitis la vilaĝanojn viziti en urbo ŝtalan fabrikan, tekstilan fabrikan kaj farejon de brikoj kaj tegoloj, kaj promeni en parko kaj ĝui filmon. Tio multe larĝigis ilian vidkampon, sed ili jam kutimis al la vivo en la groto. Malgraŭ ke la ŝtato admonis ilin transloĝiĝi el la groto, plejparto de ili insiste restas en la groto prefere kun hirundoj kiel najbaroj.

Nun en loko kelke da km for de la groto konstruiĝas hidroelektrejo, kiu post nelonge donos elektron al la grotaj familioj. ■



Teksado



Sekigado de greno






Legomo-kulturado ekster la groto

Oni uzas klaran kaj dolĉan fontakvon.









"Mangu, kokido!"



Familioj en la groto



Elementa lernejo en la groto



Vinfarado



Kuirado de teo






Hongkong-aj turistoj venis al Buyang, portante rubandon kun vortoj "Por pasigi la Printempan Feston hejme".



Kun kamparana bebo

# Gastado en kamparana familio

"Ĉu estas facile fari ĝjaŭzi-ojn?"







Spertado de portado de palankeno



Lernado de teksado

En domo de kamparanoj





Li interesigas pri la muzikilo.

Teksto de WANG DEQUAN  
Fotoj de LIU SHUI

Estas ordinara Buyang-vilaĝo en la urbo Tai'an, Shandong-provinco, norda Ĉinio. En la vilaĝo sur arboj pendas pezaj flavaj maizspikoj kaj sur muroj ruĝaj kapsikoj kaj blankaj ajloj. Tie turistoj povas esti bone akceptataj de la gastamaj kamparanoj. Mastrino prezentas al la gastoj teon, arakidon, jujubojn kaj kaŝtanojn. Tagmeze la gastoj povas fari *ĝjaŭzi*-ojn kun la gemastroj; ili povas ankaŭ uzi balgoblovilon ĉe forno por fari patkukojn. Estas agrable por ili manĝi bongustajn pladojn faritajn de ili mem kun la gemastroj.

Krom ĝui kamparajn manĝaĵojn, ili povas ankaŭ lerni kamplaborojn: printempe ili

povas plugi kampon per bovo, somere helpi rikolti tritikon kaj aŭtune pluki pomojn. Ilia turismado tie plenas de densa kampara etoso.



Rikolto de maizo

Adiaŭo



Dancado de jangge-danco





● Post longatempa preparado bone iras la laboro konduki akvon el sudo al nordo de Ĉinio, t.e. konduki akvon el la supra, meza kaj malsupra partoj de Yangzi-rivero al la nordokcidenta kaj norda Ĉinio. La programo konsistas el tri linioj, t.e. la okcidenta, meza kaj orienta.

Laŭ la orienta linio, utiligante la Grandan Kanalon inter Pekino kaj Hangzhou, oni kondukos akvon el la malsupra parto de Yangzi-rivero al la orienta parto de Huanghuaihai-ebenaĵo, inkl. de Tianjin. Laŭ la meza linio en la proksima estonteco oni kondukos akvon el la supra parto de Hanjiang, branĉo de Yangzi-rivero, al Pekino, kio utilos ankaŭ al multaj lokoj de la Nordĉinia Ebenaĵo kaj, kiam la konstruado ĉe la Tri Gorĝoj de Yangzi-rivero estos finita, oni kondukos akvon rekte el la Akvorezervejo de la Tri Gorĝoj. Laŭ la okcidenta linio oni kondukos akvon el la supra parto de Yangzi-rivero al la supra parto de la Flava Rivero kaj liveros akvon al la 6 provincoj kaj aŭtonomaj regionoj de nordokcidenta Ĉinio. Kiam finiĝos la laboro, ĉiujare dekoj da miliardoj da tunoj da akvo fluos en nordan Ĉinion, kie mankas akvo.

● Ĉinio jam difinis sian celon pri forstumado en la nova periodo: ĝis 2005 en la tuta lando aperos 11.5 milionoj da hektaroj da nove plantitaj arbaroj kaj tiam 19.4% de la ĉina teritorio estos kovritaj de arbaroj; ĝis 2030 la areo de la nove plantitaj arbaroj atingos 46 milionojn da hektaroj kaj la arbaroj kovros pli ol 24% de la ĉina teritorio, tiam multe mildiĝos la trosekeco kaj sablovento en la supraj kaj mezaj basenoj de Yangzi-rivero kaj la Flava Rivero, en nordorienta, nordokcidenta kaj norda Ĉinio kaj preskaŭ ĉiuj tieaj montoj estos verdaj; kaj ĝis 2050, pli ol 26% de la areo de la tuta lando estos kovritaj de arbaroj, kaj oni atingos la difinitan celon de verdigado.

● La Internacia Aŭto-industria Ekspozicio en 2000, Pekino, estis multe atentata de loĝantoj de



La Internacia Aŭto-industria Ekspozicio en 2000, Pekino

Pekino.

La ekspozicion partoprenis mil famaj aŭto-industriaj korporacioj kaj fabrikoj el Ĉinio, Usono, Germanio, Japanio kaj aliaj 19 landoj. Estis eksponataj 430 aŭtoj kun markoj Benz, BMW, Santana k.a. 400 000 homoj vizitis la ekspozicion, kies temo estas "Akcelu la ekonomian disvolviĝon en la nova jarcento per avangardaj sciencoj kaj tekniko en aŭto-industrio".

● Akvomelonoj produktitaj en Daxing-gubernio, Pekino, estis rigardataj kiel tributo por imperiestra familio jam en Ming-dinastio (1368-1644). Ili estas dolĉaj kaj tre bongustaj. Junie ĉiujare oni okazigas akvomelonan festivalon kaj pro tio diskoniĝas Daxing, kiu nun havas komercan rilaton kun pli ol 30 landoj kaj regionoj. En 1999 ĝia industria kaj agrikultura produktovaloro atingis 6.839 miliardojn da juanoj.

● Oni trovis maron da rododendroj kun areo de 1 000 kvadrataj kilometroj sur la monto Sejila en Nyingchi-gubernio, Tibeto, Ĉinio. Tie estas 25 specioj de rododendroj, prosperantaj junie sur la tuta monto, kun flavaj, blankaj, purpuraj, ruĝaj kaj palruĝaj floroj.

● S-ro Zhu Zhoulu, kies maldika intesto nun longas nur 28 cm. post ablacio, estas nomata senintesta junulo. Dank' al kuracado far fama ĉina kirurgo, li bone vivis jam 13 jarojn. Tial li fariĝis bone kaj longe vivanta homo kun plej

mallonga maldika intesto. Antaŭ nelonge ĉina nefrologo faris al li renan transplanton. Li resaniĝis kaj jam el-hospitaliĝis.

● Fine de majo ĉiujare, bronza statuo de granda hinda poeto Tagore inaŭguriĝis en

la Pekina Universitato.

Tagore naskiĝis en 1861 kaj mortis en 1941. Kiel la unua azia poeto, kiu ricevis Nobel-premion, li verkis amasegon da poemoj, kantoj, operoj kaj noveloj. Li prelegis multajn fojojn en la Pekina Universitato kaj ĉiam simpatiis kaj respektis la ĉinan popolon.

● La abato de Shaolin-templo, Henan-provinco, kompilis libron, kiu detale konigas la pugnadon, bastonadon, ĉigong-on kaj medicinon, kaj donacis ĝin al la Ŝtata Biblioteko, per tio li rompis la antaŭan tradicion, ke la eminentaj luktartoj kaj medicinaj receptoj de Shaolin-templo restas sekretaj al la ekstera mondo.

Oni diris, ke la abato veturis al Pekino por donaci la libron pro du kialoj: (1) la ĉina popolo konu sianacian budhisman esencon kaj konservu ĝin; kaj (2) nuntempe iuj, al kiuj tute fremdaj Shaolin-luktarto kaj medicino, eldonis verkojn pri Shaolin-luktarto kaj alportis malbonan influon, tial li volas konigi la aŭtentikan Shaolin-kulturon al tiuj, kiuj atentis la ĉinan budhismon.

● Minsk, aviadila ŝipo, nomata Mara Giganto, 274 m. longa kaj 42 000 t. peza, produktita de Rusio, atingis Shatoujiao de Shenzhen, Guangdong-provinco. Tiu malmobilizita ŝipo estis aĉetita de civila entrepreno de Ĉinio kaj kiel milita ekipaĵo estas montrata en la marborda pitoreskejo.



## DOMO DE MODERNA ĈINA LITERATURO INAŬGURITA

Post 7-jara preparado antaŭ nelonge estis jam finita la unuaperioda konstruado de la Domo de Moderna Ĉina Literaturo kaj nun ĝi estas malfermita en Pekino. Post ĝia kompleta finkonstruo ĝi fariĝos la plej granda domo de la moderna literaturo de Ĉinio.

La nomita domo estas centro de materialoj de la moderna ĉina literaturo, kun literatura muzeo, biblioteko kaj arkivo. Tie oni ankaŭ povas fari teoriantudon

manuskriptojn, leterojn kaj taglibrojn de modernaj ĉinaj literaturistoj kaj recenzojn pri iliaj verkoj, literaturajn gazetojn, ĵurnalojn k.a. Ĝi estas trezorejo de la ĉina literaturo en la 20-a jarcento. Nun tie estas konservataj pli ol 300 000 objektoj.

La domo havas 4 eksponejojn ĉiu kun 500 kvadrataj metroj. En la unua etaĝo estas eksponejo de fotoj pri ĉinaj literaturaj majstroj en la 20-a jc. En la dua etaĝo — tiu pri la moderna ĉina literaturo. En la tria etaĝo — tiu pri libroj de modernaj ĉinaj verkistoj, kaj en la subtera etaĝo — tiu pri miniaturaj ksilografajoj por la libroj konservataj en la



La Domo de Moderna Ĉina Literaturo



En eksponejo

kaj literaturan interŝanĝon. Ĝia ĉefa tasko estas kolekti, konservi, ordigi kaj esplori verkojn,

Domo de Moderna Ĉina Literaturo. En la ŝrankoj starantaj apud la muroj estas pli ol 80 000 ekzempleroj da libroj.

Krome, en la domo estas ankaŭ pluruza salono kun areo de 320 kvadrataj metroj, havanta instalaĵon por simultana tradukado en 5 lingvoj. En la biblioteko kun 820 kvadrataj metroj dense staras librobretaroj kun 110 000 ekzempleroj da libroj indeksataj per komputiloj. La manuskriptokonservejo kovras 270 kvadratajn metrojn,

kun 11 000 manuskriptoj. Ĝi estas la plej granda aŭtoritata tiuspeca biblioteko en Ĉinio.

S-ro Bakin, fama literaturisto kaj esperantisto de Ĉinio, faris grandan kontribuon al la starigo de la domo. Se vi iras supren laŭ la ŝtuparo de la domo, vi povas tuj vidi sur la kupra balustrado mansignon de Bakin. Oni faris tion, por ke la vizitantoj perceptu la diligentecon de Bakin en verkado kaj lian fervoron por la literatura domo.

## DENOVE ALLOGAS ĈINSTILAJ VESTOJ

En Ĉinio denove furoras ĉinstilaj vestoj, tio devenis de la vesto-montrado kun la temo pri la Imperiestra Palaco en Pekino. La arta stilo de tiaj vestoj strikte rilatas al la arkitekturaj trajtoj de la Imperiestra Palaco. La vestoj portataj de la modelinoj donis al la Imperiestra Palaco vivigan forton kaj vekis grandan eĥon en la rondo de la ĉinaj fasonistoj. Pro la natura intimeco de la ĉinoj al sianaciaj tradiciaj vestoj multe da fasonistoj serĉis en la tradicia ĉina kulturo inspiron por renovigi la vestojn. Kaj de tio aperis fasonaj trajtoj distingiĝaj je nacia gusto. Ofte projekciado de televida filmo pri Qing-dinastio vekas furoron de Qing-stilaj vestoj en iuj urboj, kaj nun denove vidiĝas larĝaj pasamentoj sur vestoj, vidataj ĉiam en la manĉuraj roboj, kaj nun ankaŭ la oblikve butonumataj vestoj estas ŝatataj de junaj virinoj. Kompreneble ne nur Qing-stilaj vestoj vidiĝas hodiaŭ en Ĉinio, sed ankaŭ la vestoj de aliaj dinastioj trovas sian postsignon en la vestoj de la hodiaŭaj ĉinoj.

Inter la modaj vestoj tipaj estas manĉuraj roboj, kiuj bone sidas sur la virina korpo kaj klare manifestas la virinan belon: svelteco, matureco, mildeco kaj kvieteco. Ili impresas kaj klasike kaj diskrete. Ĝuste pro tio oni diras, ke la manĉura robo sur

ĉinaj bonedukitaj virinoj odoras apartajn karakterizaĵojn.

Por la vere manĉura robo la manikoj kaj la brusto kaj dorso estas kune tajlitaj, sed nun oni tajlas laŭ la okcidenta maniero kaj la brusto kaj la dorso havas delikatan diferencon, dum la manikoj estas alkudritaj poste kaj pro tio la vesto pli bone sidas sur la portanto. Laŭ ŝanĝiĝo de la sezonoj oni sin vestas per robo maldika, substofita aŭ vatita.

Nun tia robo estas ŝatata ne nur de virinoj de Ĉinio, sed ankaŭ de tiuj de Filipinoj, Malajzio kaj aliaj sudorientaziaj landoj. Ĝi plaĉas ankaŭ al iuj de Germanio, Italio kaj aliaj eŭropaj landoj.

## GRANDA MURO EN SUDA ĈINIO

La Granda Muro estis konstruita por defendi kontraŭ nordaj nomadoj, sed ekster la atendo ĉinaj arkeologoj antaŭ nelonge trovis la similan muron en la okcidento de Hunan-provinco, kie loĝas mjaŭ-oj. Ĝi, 190 km. longa, serpentumas en la gubernio Fenghuang.

La nomita Granda Muro en Hunan konstruiĝis en 1573-1620 en Ming-dinastio. Ĝi, konstruita

komplete el ŝtonoj altas 3 m. kaj dikas 2 m. ĉe la bazo kaj unu m. ĉe la supro. Ĝi estis konstruita plejparte sur danĝeraj montoj kaj aspektas neniom malpli impone ol la Granda Muro ĉe Juyong-pasejo kaj Badaling en Pekino. Kaj plie, ĝi bone montras la sudajn pejzaĝojn kaj naciajn morojn de la naci-malplimulto en la okcidenta Hunan-provinco.

La Granda Muro konstruita en Ming-dinastio diferencas de la ordinara urbomuro en tio, ke ĉiu ĝia peco longas centojn da km., plie ĝia komenciĝo ne estas ligita al la fina ekstremo, kaj trie, ĝi estas defendsistemo el muroj, fortresoj, turoj por defendo kaj gvato. Juĝate laŭ tiuj tri punktoj, la muro en la okcidento de Hunan-provinco havas tute samajn trajtojn kiel tiuj de Ming-dinastio.

Oni konstruis tiun muregon por sin defendi kontraŭ atako el sudokcidento. Ĉar en la historiaj materialoj de Ming-dinastio mankas koncernaj notoj pri ĝi kaj plie oni antaŭe ne faris esploron pri ĝi, tial dum longa tempo oni preteratentis ĝian ekziston.

## PLEZURO EN KVADRATA KORTO

Ĉindevena usonano Li Jinghan loĝas en kvadrata korto de Pekino. Estas plezuro por li en somera vespero ĝui en sia korto sunsubiron, rigardi kiel zefiro balancas salikajn branĉojn kaj kiel kolomboj libere flugas en la ĉielo.

S-ro Li estas kompano de usona advokatejo. Li naskiĝis en Usono kaj ekde 1991 vivas en Pekino, kie li havas fiksloĝejon kun kvadrata korto.

Antaŭe malnova loĝejo kun kvadrata korto en Pekino estis destinita por unusola familio de ŝtato-ficisto, riĉa sinjoro aŭ komercisto. Se en tia loĝejo loĝis pluraj familioj, do en la ĉefa domo loĝis certe kompare riĉa familio, dum en la orienta kaj okcidenta domoj malriĉaj homoj: en la orienta — pli malriĉaj, kaj en la suda — kulioj. La loĝejo de s-ro Li konstruiĝis antaŭ 400 jaroj. Tiu malnova loĝejo nun estas bela kaj komforta post riparado. Fiera pri la loĝejo, s-ro Li diris: "Mi devenis de Ĉinio kaj miaj prapatroj vivis tie. La loĝejo kun kvadrata korto estas propra al Ĉinio. Loĝante tie, mi sentas min kiel hejme."

Ambaŭflanke de la korta koridoro de s-ro Li pendas pentraĵoj de modernaj pentristoj. La norda domo antaŭe estis dividita en kelke da malgrandajn ĉambrojn, sed s-ro Li malseptis la domon, ke ĝi impresas vaste kaj impone. En la ĉambro estas multaj mebloj, plejparte en antikva stilo, kaj ĉiu el ili elspiras fortajn historiajn trajtojn kaj estas okulfrapa.

Iu blondhara usonanino, pasloĝanta en la hejmo de s-ro Li, diris kun admiro: "Kia belega loĝejo!"



La Granda Muro en suda Ĉinio



# Bela Hainan-insulo

La tria censo de Ĉinio montras, ke la meza vivdaŭro de la loĝantoj de Sanya okupas rimarkindan lokon en la tuta lando, dum tiu de la loĝantoj de Nanshan estas la plej longa en Sanya, kaj tion priskribas la ĉina popoldiro: "Feliĉo granda kiel Donghai-mar, vivo longa kiel Nanshan-monto."

de ZHANG QINGZHEN

**E**N la sudo de Ĉinio situas Hainan-insulo, la dua granda insulo en Ĉinio, post Taiwan. En la historio oni ĉiam asociis tiun malproksiman, sterilan insulon kun ekzilitaj malliberuloj kaj degraditaj ŝtaticistoj. Post la fondiĝo de

la nova Ĉinio ĝia fizionomio multe ŝanĝiĝis, tamen antaŭ 1988, kiam ĝi provinciĝis kaj fariĝis speciala ekonomia distrikto, al ĝi mankis altira forto. Nur post 1988 ĝia disvolviĝo vekis la atenton de la publiko. Ĝia turisma servo dis-

volviĝis rapide, kiu nun estas ĝia grava entrepreno. Tra la tuta insulo troviĝas originalaj ripozejoj, kiuj altiras al si multe da ĉinaj kaj alilandaj turistoj.


## PITORESKA TIANYA-HAIJIAO

Oni diris, ke la novan paĝon en la historio de Hainan-insulo malfermis la kanto "Venu al Tianya-Haijiao!". En Ĉinio la kanto furoris en la 80-aj jaroj. Tianya-Haijiao estas turisma loko en la urbo Sanya en la suda parto de la insulo. Pro sia granda fameco ĝi iagrade estas kromnomo de Hainan-insulo.

Tianya-Haijiao situas ĉe la maro je 23 km. sudokcidente de Sanya. En la antikveco oni gravuris la ideogramojn Tianya-

Haijiao sur du gigantaj rokoj kaj pro tio la loko ricevis sian nomon. Tianya signifas randon de la ĉielo kaj Haijiao — ekstremon de la maro. Antaŭ 12 jaroj tie vidiĝis nur ondoj, rokoj kaj sporadaj fiŝboatoj.

La nove konstruita pitoreskejo Tianya-Haijiao kun areo de 16.4 km. konsistas el du partoj, la



Gigantaj rokoj kun ideogramoj Tianya-Haijiao  
Foto de YU XIANGJUN

orienta kaj la okcidenta. La orienta ampleksas la Kolonon de la Suda Ĉielo, Rokon de la Ĉiela Rando, Rokon de la Mara Angulo, Maran Paradizon, Akvarion kaj Fajrofarejon por la 11-a Azia Sportkunveno. La okcidenta plejparte estas nove konstruita kun naturaj pejzaĝoj kaj ankaŭ kun artefaritaj pejzaĝoj, inter kiuj estas statuoj de 13 famaj personoj, kiuj havis striktan rilaton kun la historio de Sanya. Ĉe la enirejo de la pitoreskejo estas la Ĝardeno de Li-aj Moroj, la plej granda en Hainan-provinco. En la ĝardeno vidiĝas trajtoj de la ekonomio, kulturo kaj socia vivo de li-oj.

Dadonghai estas la plej granda turisma loko ĉe la tropika marbordo en Hainan-provinco. Tie estas la Cervo-monto, kiu donas

birdorigardon al la tuta urbo. La monto ricevis sian nomon pro bela amrakonto: Bela feino transformiĝis en cervon. Persekutate de juna li-nacia ĉasisto, ĝi alkuris tien, sed subite vidis, ke antaŭe sterniĝas senlima maro. Ĝi ne povis kuri plu. La ĉasisto streĉis pafarkon kontraŭ ĝi. Tiumomente la aminda cervo reprenis sian originan formon. La bela feino kaj la juna ĉasisto enamiĝis unu al la alia kaj fine geedziĝis. Rakonto diras, ke en la montpieda vilaĝo estis loĝdomo de la juna paro.

La kultura turisma loko Nanshan estas alia loko ofte vizitata de turistoj. Ĉar la monto tie similas al giganta testudo, oni do nomas ĝin Testuda Monto. Antaŭ 1 200 jaroj fama budhisma majstro Jianzhen de Tang-dinastio (618-907) atingis la lokon post sia 5-a malsukcesa vojaĝo al Japanio. Tie li predikis unu jaron kaj duonon. Nun oni malfermis nur parton de Nanshan al la turistoj. Oni konigas la tradician ĉinan kulturon, folkloran kulturon kaj budhismon. Oni konigas ne nur la lokajn morojn kaj pejzaĝojn, sed ankaŭ historiajn objektojn. Post nelonge aperos 4-vizaĝa statuo de Avalokitesvaro 13 metrojn alta.

La tria censo de Ĉinio montras, ke la meza vivdaŭro de la loĝantoj de Sanya okupas rimarkindan lokon en la tuta lando, dum tiu de la loĝantoj de Nanshan estas la plej longa en Sanya. La pejzaĝo de Nanshan bone harmonias kun tiu de Dadonghai, kaj ilin priskribas la ĉina popoldiro: "Feliĉo granda kiel Donghai-mar, vivo longa



kiel Nanshan-monto."

En la lastaj jaroj multaj gefianĉoj aŭ geedzoj el Usono, Japanio, Koreio, Kanado kaj Singapuro kaj el aliaj lokoj de Ĉinio vojaĝis al Sanya por tie okazigi nupton aŭ festi geedziĝan jubileon. En la parko "Cervo" ili ĝuis amrakonton kaj amkanton. Ili batis feliĉigan sonorilegon en Nanshan-parko. Por kontentigi la bezonon de la turistoj, ekde 1997 oni okazigas la Internacian Nuptan Festivalon ĉiujare en la 18-a de novembro en Tianya-Haijiao.

## BELEGA YALONG-GOLFO

Sanya, iama malgranda fiŝista vilaĝo, dank' al disvolvo en la pasintaj 12 jaroj, fariĝis ŝtatnivela marborda turisma urbo kun tropikaj pejzaĝoj. 20 km. oriente de la urbo estas golfo en duonluna formo. Ĝi estas Yalong-golfo 8 km. longa. Tie la montoj estas verdaj, akvo blua, sablo blanka, rokoj groteskaj, kavernoj kvietaj kaj neniam malvarmas. La marakvo estas tiel klara, ke oni povas vidi ĝis loko 9 metrojn profunda.

En la turisma loko Yalong-golfo oni jam konstruis luksan hotelon, somerdomon, centran placon por diversaj uzoj, ĉemaran parkon, banejon, ĉiovendejon, tenisludejon kaj sanitaran servon. Tie mi vizitis mirindan marfundan mondon. Min interesis la trembrilaj smeraldaj fiŝoj, aro post aro da hirundvostaj fiŝoj, ruĝaj umeaj fiŝoj, molaj kaj malmolaj koraloj. En la korala naturparko estas aroj da molaj koraloj kaj floroj de malmolaj koraloj plej bone protektataj en la mondo. Tie oni povas ankaŭ fiŝhoki malproksime de la bordo, mergiĝi en profunda maro, paraŝuti, veladi kaj surfotabuladi.

La Konkula Halo situas sub la centra placo de Yalong-golfo. Sur ĝiaj kvar muroj estas desegnoj de diversaj maraj algoj kaj akvaj herboj. La halo konsistas el kvar

eksponejoj: Atlantiko, Pacifiko, Hinda Oceano kaj Suda Ĉina Maro. Tie vidiĝas diversformaj konkuloj, inkl. de belegaj spiralfarmaj konkuloj, 70-80 cm. longaj, vivantaj en la Suda Ĉina Maro; oraj trezoroj en formo de renversita hemisfero, vivantaj en la Hinda Oceano; neĝblankaj atlantikaj konkuloj, kiuj impresas kiel flugiloj de anĝeloj sur klasikaj eŭropaj olepentraĵoj.

## LOKAJ MOROJ EN SMERALDA URBO

Por turismo en Hainan la du lokoj estas nepre vizitataj: Sanya kaj Tongshi. Forlasinte Sanya, ni daŭrigis nian vojaĝon al Wuzhi-monto meze de la insulo.

La verda Wuzhi-monto famas pro siaj originalaj naturaj pejzaĝoj, klimato kaj naciaj moroj. La urbo Tongshi en la sino de montoj estas honorita kiel Smeralda Urbo. Ĝi iam estis ĉefurbo de la Li-kaj Mjaŭ-nacia Subprovinco de Hainan kaj estas ĉefa loko por li-nacia festo "La Tria de la Tria Monato". Nun tie estas pluraj famaj vizitindaj lokoj: la Kultura Vilaĝo de la Ĉina Nacio, Vilaĝo kun Li-aj kaj Mjaŭ-aj Moroj, Feria Vilaĝo de Ali-monto, Arbara Parko de Wuzhi-monto, Akvofalo de Taiping-monto, Produkta Bazo de Li-aj Brokatoj kaj Muzeo de Hainan-aj Naciminoritatoj.

La Kultura Vilaĝo de la Ĉina Nacio kovras 450 000 kvadratajn metrojn. Ĝi estas granda turisma loko, kie oni povas ĝui popolajn artojn de diversaj nacioj de Ĉinio, iliajn morojn, loĝdomojn, manĝaĵojn kaj metiartaĵojn. En la parko estas multaj montoj kun densa subtropika arbaro ĉe klara akvo. En la arbaro oni konstruis li-stilajn boat-formajn domojn, mongolajn jurtojn, tuĝja-naciajn pend-domojn, dong-stilan kontraŭpluvan ponton, ujuguran moskeon k.a. Diversnaciaj aktoroj kaj indiĝenoj kantas, dancas kaj prezentas al la turistoj lokajn etmanĝaĵojn kaj diversajn metiartaĵojn.

Kompare kun naciminoritataj vilaĝoj en aliaj lokoj, la nomita kultura vilaĝo karakteriziĝas per aktiva partopreno de turistoj kaj densa kultura etoso, kaj precipe prezentado de la li-aj moroj originalaj en Hainan. Ili ege plaĉas al la turistoj.

2 km. sude de la urbocentro estas fama Vilaĝo kun Li-aj kaj Mjaŭ-aj Moroj. La vilaĝestro estas loka kamparano. En 1994 li elspezis 5 600 000 juanojn por konstrui tiun vidindejon de 4.7 hektaroj, kun boatformaj domoj.

En la proksima estonteco en Tongshi oni povas ĝui multe da aliaj turismaj aktivadoj, kiaj ĉasado, alpismo kaj aventuro. ■




La centra placo en la turisma loko Yalong-golfo

# Raportoj pri la okcidenta Hubei-provinco (I)

La ginko, la plej granda en Ĉinio, altas 30 metrojn kaj la brusta diametro estas 6 metroj. Oni diris, ke la trunko de la arbo estis rompita de fulmo, sed ĉe ĝia radiko elkreskis 17 trunketoj, kiuj formis la nunan aspekton. Kvankam 1 500-jara, ĝi estas vivipova kaj ĉiujare donas 750 kg. da fruktoj.

de WANG HANPING

**E**N Ĉinio estas 30 aŭtonomaj sub-provincoj kaj la plej nova el ili estas la Enshi-a Tuĝja- kaj Mjaŭ-nacia Aŭtonoma Subprovinco fondita en 1983. Enshi situas en la okcidenta Hubei-provinco meze de Ĉinio. Tie estas multaj montaroj, kaj pro tio la ekonomio progresis kompare malrapide. Tial la subprovinco estis enlistigita kiel disvolvota loko kadre de la Plano de Disvolvado de la Okcidento de Ĉinio, kvankam ĝi ne estas ene, nur najbare al tiu regiono. Fine de la pasinta printempo mi vizitis 5 el la 8 gubernioj de la subprovinco kaj plezure perceptis iliajn belaĵojn.



La plej granda ginko en Ĉinio

## TREZORO PROFUNDE EN MONTARO

Mi konfesas, ke antaŭ mia vizito al Enshi mi neniam aŭdis pri ĝia nomo. La loko sin kaŝas profunde en montaroj, kaj la distanco inter ĝi kaj la provinca ĉefurbo Wuhan estas 700 kilometroj. Pro tio ĝi estas malofte vizitata de la provincanoj kaj alilokanoj. S-ro Hu, kiu akompanis nin dum la vizitado, diris, ke li venis labori en la loko antaŭ 30

jaroj. Tiam li devis unue ŝipveturi de la provinca ĉefurbo kaj poste veturi per aŭtobuso, kaj tiamaniere li bezonis 3-4 tagojn por atingi la lokon. Nun sola aŭtoveturado postulas unu tagon kaj aviado nur unu horon.

En la ĉefurbo de la subprovinco s-ro Guo, subprovincestro, konigis al ni la ĝeneralan staton de la loko. La subprovinco arebas 24 milojn da kvadrataj kilometroj, kun 3.8 milionoj da loĝantoj. Krom Han-

nacio, tie vivas ankaŭ 28 nacimalplimultoj, kaj la tuĝja- kaj mjaŭ-oj konsistigas duonon de la totala loĝantaro. S-ro Guo estas membro de Tuĝja-nacio.

Montaroj kovras kvar kvinonojn de la areo de la loko. Tie la montoj estas apikaj kaj riveroj torentaj. Tie estas riĉa rezervo de akvoenergia, minoj kaj diversaj kreskaĵoj.

Menciindas selena mino kaj amonitoj. 45.8% de la areo de la subprovinco estas kovritaj de primitivaj arbaroj kaj miloj da specoj da vegetaloj estas konstatitaj. Inter ili troviĝas 33 raraj postvivintaj specoj, inkluzive de ginko kaj metasekvojo. La loko estas konata ankaŭ kiel tenejo de kuracherboj de la meza Ĉinio, kie troveblas duono de la specoj de la ĉinmedicinaj kuracherboj.

En Enshi, kiel "botanika ĝardeno", ni unue vidis la unuan mirindaĵon — ĉina ginko. En iu Tuĝja-nacia vilaĝo en Xuan'engubernio ni vidis ginkon, la plej grandan en Ĉinio. La arbo altas 30 metrojn kaj la brusta diametro estas 6 metroj. Oni diris, ke la trunko de la arbo estis rompita de fulmo, sed ĉe ĝia radiko elkreskis 17 trunketoj, kiuj formis la nunan aspekton. Kvankam 1 500-jara, ĝi estas vivipova kaj ĉiujare donas 750 kg. da fruktoj.

La rezervejo de la monto



Sep Fratinoj en Xuan'en estas unika kreskejo de kolombo-arboj de Ĉinio. La blankaj floroj de la arbo estas belaj kaj aspektas kiel kolomboj ekflugontaj kontraŭ vento. Same kiel ginko, kolombo-arbo estas postvivinta vegetalo kaj unuagrada protektata arbo-speco en Ĉinio. Antaŭ 10 jaroj fakuloj trovis tie 1 700 hektarojn da kolombo-arboj, kaj kune kun ili kreskas 892 specoj da aliaj arboj kaj 146 specoj da sovaĝaj bestoj, kaj inter ĉi tiuj estas 14 raraj specoj. Kiam ni atingis la lokon, ni vidis multajn "blankajn kolombojn". Oni diris, ke en la unuaj someraj tagoj la loko estas lando de "blankaj kolomboj".

Originala geografia medio dotis Enshi per originalaj biologiaj produktaĵoj kun lako kaj oleo de paŭlovnio (*Paulownia fortunei*) kiel ekzemploj. La lokanoj estas sin liberigantaj de konservativismo kaj sinfermo kaj utiligas siajn avantaĝajn riĉfontojn por starigi serion da bazoj por originalaj produktaĵoj. Iuj legomoj estas eksportataj eksterlanden.

## EN LA MEZO DE ARBARO

En Enshi ni rimarkis, ke iuj loknomoj karakteriziĝas per interrilitoj kun imperiestro. Oni diris al ni, ke Tuĝja-nacio estas indiĝena. En Yuan-dinastio (1279-1368), por pli efike praktiki regadon super la regionoj de

nacimalplimulto, la centra registaro instalas heredeban oficon Tusi, kiu ĝuis certagradan aŭtonomecon. En 1735 la ofico estis abolita, kaj estis starigita la administra distrikto gubernio. En la ĉina lingvo "Enshi" enhavas la sencon de "favoro de imperiestro", kaj "Xianfeng", nomo de gubernio, estas nenio alia ol la titolo de imperiestro de Qing-dinastio (1644-1911). Ni forveturis de Xuan'en al Xianfeng por viziti la ruĝon de kastelo de Tusi.

La kastelo nomata Tangya ĉe monto kaj akvo kovras 100 hektarojn. Ĝi iam estis la politika, ekonomia kaj kultura centro ĉe la limo inter Hubei- kaj Sichuan-provincoj. Rigardate de malproksime, montriĝas verda konturo de la kastelo, en kiu ni vidis stratojn pavimitajn per longaj ŝtonblokoj, murojn el argilo kaj ŝtono, ŝtonajn arkadojn kaj tombojn de Tusi-regantoj. Tie estas familio Qin vivinta 18 generaciojn, pli ol 400 jarojn tra 3 dinastioj.

Enshi estas arbara maro en la okcidenta Hubei-provinco, dum Xianfeng — la centro de la arbaro. 59% de la areo de la gubernio estas kovritaj de arbaro kaj 91% de la tero verdigitaj. Ĉie ni vidis verdan koloron. Antaŭ 10 jaroj Xianfeng-gubernio jam komencis praktiki la disvolvan strategion de verdigado, pli ol 10 000 kamparanoj transloĝiĝis el profunda montaro kaj cedis 5 000 hektarojn da


grenkampoj al arbarizado. En la disvolvado de la okcidenta Ĉinio la unua afero estas solvo de la problemo de ekologia medio. Laŭ la postulo "cedi kampojn al arbarizado kaj verdigi montojn malpermesante arbohakadon", oni pli multe arbarizos kampojn.

Ni vizitis familion sur montodeklivo. Pro pluveto mastro Jiang Zhenshan kaj liaj edzino kaj bofilino restis hejme. Jiang diris, ke lia familio havas 5 membrojn kaj kulturas unu hektaron da kampo. Laŭ decido, ke kampo kun dekliveco de pli ol 25 gradoj devas esti cedita al arbarizado, du trionoj de lia kampo estas tiaj. Pri la arbarizado de kampoj li diris: "Tio estas decido de la registaro por la disvolvo de la okcidento, kaj ni certe devas subteni. Kaj fakte niaj interesoj ne estas damaĝitaj." Li faris kalkulon: oni rikoltas 3 000 kg. da maizo sur ĉiu hektaro; nun la registaro senpage donas ĉiujare al la kamparanoj 2 250 kg. da greno kontraŭ ĉiu hektaro da kampo, kaj krome 1 050 juanojn, por ke ili aĉetu arbidojn. Lia edzino konigis al ni sian spezadon kaj esprimis plenan fidon pri la estonta vivo.

La akompananto konigis al ni, ke 2000 estas la unua jaro por arbarizado de kampoj. Oni devas laŭplane arbarizi la cedendajn kampojn kaj aŭtune estos kontrolo al la arbarizado de ĉiuj familioj. ■



Intervjuo kun montano Jiang Zhenshan



Vizito al la ruĝo de kastelo de Tusi



# Rekompenco por montvilaĝa patrino

Demandite pri la sukcesa edukado al la infanoj, ŝi ĉiam tiel respondis: "Mi dankas tion al mia dorskorbo."



Wang Chengju kaj ŝia edzo

de LIN WANPING

**E**N unu familio elbakiĝis tri magistroj, tio eble ne sensacias en ĉina urbo, sed estas miraklo en ĉina vilaĝo, en profunda montaro. Jen kial cirkulas anekdoto pri kamparanino Wang Chengju kaj ŝiaj tri filoj.

Ŝia unua filo aĝas 38 jarojn. En 1979 li ekstudis en la Kartografia Universitato de Wuhan. En 1986 li studis por magistriĝo. Nun li havas profesion en Shenzhen.

Ŝia dua filo estas 36-jara. En 1988 li diplomiĝis el la Tongji-a Medicina Universitato en Wuhan. En 1992 li komencis studi en la universitato por magistriĝo. Nun li laboras en la Centra Hospitalo de Shantou, apudmara urbo de Guangdong-provinco.

Ŝia tria filo havas 34 jarojn

kaj studis pri petrola industrio. Fininte la studon en sia lando por magistriĝo, li venis al Usono por studi en la Universitato de Austin por doktoriĝo.

Demandite pri la sukcesa edukado

al la infanoj, ŝi ĉiam tiel respondis: "Mi dankas tion al mia dorskorbo!"

## ABOCO-LERNADO EN DORSKORBO

La familio de Wang Chengju vivas en profunda montaro en Hubei-provinco. La edzo estas indiĝena kamparano. En 1962 li venis al la hejmo de Wang Chengju kaj edziĝis al ŝi<sup>2</sup>. S-ino Wang estis instruistino de la lernejo de la vilaĝo, izolita sen elektro kaj akvosistemo. Nokte oni lumigis kerosenan lampon aŭ torĉon. La vilaĝo distancas de la urbo je 110 kilometroj, kaj por viziti la plej proksiman foiron, oni devis piediri almenaŭ 2 horojn laŭ monta vojo. En la 60-aj jaroj naskiĝis al la familio tri infanoj. La patrino de Wang estis malsana. La familio el 6 membroj vivis de la terkulturado de la edzo kaj

ŝia malalta salajro.

La edzo ĉiam faris kamplelaborojn, kaj Wang Chengju, krom instrui en la lernejo, devis ankaŭ flegi la patrinojn kaj la infanojn. La tri filoj ĉiu pasigis sian infanecon en la dorskorbo de la patrino. En la dorskorbo ili sendevige ricevis la unuan klerigadon de la patrino. Wang Chengju donadis lecionon ofte kunportante infanon en sia dorskorbo, ĉar ŝi ne havis alian elirejon rilate infanvartadon. Ŝi estis surprizita de ĝojo, ke kiam ŝi parolis en klasĉambro, la bebo en ŝia dorskorbo imitadis ŝian parolon kaj strekadis per fingreto sur ŝia nuko. Do post la lecionoj ŝi instruis al la infano infanajn poemojn kaj enigmojn por disvolvi la pensadon kaj esprimovon kaj kreskigi lian intereson pri la ĉirkaŭaĵo. La tri filetoj povis nombri de 1 ĝis 100, kiam ili estis 2-jaraj, kaj en la aĝo de 4 jaroj ili jam povis parkeri longan tekston. La unua kaj tria filoj komencis viziti lernejon en la aĝo de 4 kaj duona jaroj, kaj en la aĝo de 6 jaroj ili jam transsaltis la klason. Ĉiuj estis elstaraj en lernado.

S-ino Wang instruadis 19 jarojn. Dank' al ŝia serioza kaj diligenta laboro, ŝiaj lernantoj estis la plej elstaraj en la loko, kaj la progreso de la tri filoj estis la plej bona atesto kaj rekompenco por la patrino-instruistino.

## SCIOJ ŜANGAS SORTON

Kiam Wang estis juna, ŝi

estis unika instruistino diplomita el mezlernejo en la vilaĝo. Pro tio ŝi havis avantaĝon kompare kun la aliaj virinoj en la edukado al siaj infanoj. Jam en la infaneco la tri filoj komprenis, ke nur posedo de scioj povas ŝanĝi la mizeran vivon kaj ebligas vidi la belegan mondon ekster la montaro.

Ŝia vilaĝo estis la plej malriĉa en la subgubernio, kaj ŝia familio estis unu el la plej malriĉaj en la vilaĝo, ĉar ĝi havis nur la edzon kiel kamplaborulon kaj ofte ŝi ne povis akurate akiri la salajron, eĉ tre malaltan. La subnutrataj infanoj havis palan vizaĝon, kaj la geedzoj ofte larmis kaŝe. Viando estis tre valora manĝaĵo. Nur en festoj ili povis havi malkarajn porkajn internaĵojn. Tra la tuta jaro ili havis nur peklitajn rafanon kaj brasikon.

Wang Chengju ne havis monon por aĉeti novajn vestojn al la infanoj, kaj ŝi faris el malnovaj vestoj de ŝi kaj de la edzo vestojn por la infanoj. Kelkfoje ŝi aĉetis malkarajn ŝtofajn pecetojn por kunkudri ilin en vestojn. Kiam la vestoj estis ne taŭgaj por la unua infano, la dua kaj tria portis ilin.

Ŝiaj infanoj neniam hontis pro la malriĉa vivo, ĉar la patrino ofte edifis ilin, ke ili ne komparu sin kun aliaj pri la materia vivo, sed komprenu, ke manko de scioj estas pli hontinda ol malriĉeco, kaj posedante sciojn kaj talenton, oni povas havi profesion kie ajn. La ekzemplo de la gepatroj estis tre bona por la infanoj. Wang Chengju preskaŭ neniam faris por si novan veston. Kvankam ŝi sin vestis malbone, tamen ŝi estis respektata en sia hejmloko, ĉar ŝi laboris bonege kaj ŝiaj filoj estis bonkondutaj kaj elstaraj en lernado.

Nun ŝiaj tri filoj jam edziĝis. La malfacila vivo en la pasintaj jaroj fariĝis ilia plej granda spirita riĉaĵo por ilia vivo. Ili estas dankemaj al siaj gepatroj.

## EDUKO EN ĜUSTA TEMPO

Wang Chengju akcentis fruperiodan edukadon opiniante, ke pli grava estas la unuafoja edukado. Ŝi diris: "Kiam la infano diras malĝentilaĵon, mensogas aŭ drinkas je la unua fojo, oni jam devas averti lin. Se ne, la infano ripetos la eraron duafoje, triafoje..., kaj fine neripareble."

Foje ŝia dua filo sentis sin malbone kaj duonvoje al la lernejo li iris al sia onklino kaj forestis de la lernejo kelke da tagoj. Reveninte hejmen, li ne diris tion al la gepatroj. Kiam la tri filoj estis hejme, la patro ordonis al la dua filo sin kritiki, kaj la unua kaj tria aŭskultis, ĝis la infanoj vere komprenis la seriozecon de la eraro.

Foje la tria filo akceptis donacojn de kamaradoj. Sed ŝi



La tri filoj de Wang Chengju

opiniis, ke la filo ne devas akcepti iliajn donacojn, ĉar iliaj familioj vivas malriĉe. Ŝi ordonis al la filo redoni la donacojn kaj eksplikis sian faron al la tuta lernejo, esprimante koran dankon al la kamaradoj. Tio profunde

impresis la aliajn, kaj nun ŝia kolego ankoraŭ emociiĝis menciante la aferon. Li diris: "Instruistino Wang estis tiom rigora al siaj infanoj!"


S-ino Wang opinias, ke oni devas atenti ĉiun bagatelon ĉe la infanoj, kaj nur tiamaniere oni povas kulturi la infanojn en homojn strebemajn, honestajn kaj povantajn elteni malfacilajn cirkonstancojn. Ŝi ofte instruis al siaj infanoj: "Miaj karaj, en malgranda korto oni ne povas kulturi eliton ĉevalon, kaj en forcejo oni ne povas kulturi arbojn taŭgajn por trabo kaj fosto. Vi ne devas eskapi de penado por esti esperdonaj."

De la infaneco la tri filoj estis bone edukataj kaj volontaj helpi la gepatrojn. En ferioj ili laboris en kampo helpe al la patro. Post la lecionoj ili ĉiamaniere serĉis ŝancon por perlabori monon cele helpi la gepatrojn pagi ŝuldon pro ilia lernopago.

Nun ĉiuj filoj havas bonan oficon kaj feliĉan vivon. Wang Chengju emeritiĝis, sed ne volis forlasi la hejmlokon kaj ankoraŭ laboras en sia kampo. Ŝi sopiras la infanojn en malproksimaj lokoj. ■

1. Dorskorbo estas plektita el bambuo kaj uzata de montanoj por porti sur la dorso diversajojn aŭ bebon.

2. En Ĉinio, precipe en la kamparo, kutime virino edziniĝas en la hejmo de la edzo, kaj se viro loĝas post la edziĝo en la hejmo de la edzino, li ofte renkontas straban rigardon, ĉar tio signifas, ke la viro estas malriĉa kaj ne povas konstrui domon por sia edziĝo, kaj la infanoj devas porti la familian nomon de la patrino, kaj tio estas malhonoro por viro. Sed nun tiu moro pli kaj pli paliĝas kaj en la urboj novaj geedzoj jam ne bezonas loĝi en la hejmo de la gepatroj, kaj ili povas havi apartan loĝejon.



En Miaogaotai

# En pitoreska urbeto Xikou

La urbeto Xikou estas ĉirkaŭita de rivero malprofunda, kies fundon kovras ruliĝantaj grandaj kaj malgrandaj. Tie prosperas verdaj herboj. Agrablas veturado sur bambua flosa laŭ la rivero.

de DONG PING

**L**A urbeto Xikou de Fenghua, Zhejiang-provinco, renomiĝas per sia kromnomo Posta Ĝardeno de la Delto de Yangzi-rivero. La tiea monto Xuedou 800 m. super la marnivelo estas kvieta kaj majesta. Ĝi estas ŝtatnivela vidindejo kun pitoreskaj pejzaĝoj kaj historiaj restaĵoj: la templo Xuedou en Xikou, religiejo de Majtrejo, estas budhisma sanktejo; tie densas

aparta loka koloro kaj bongustas frandaĵoj; krome, tie estas hejmloko de historia famulo Ĉiang Kajŝek. Ĉio tio bone harmonias kun la lokaj popolaj moroj.

## ANTIKA TEMPLE SUR PITORESKA MONTO

Ĉe la piedo de la montpinto Xuedou troviĝas ŝtona truo, el kiu ŝprucas fontakvo neĝblanka. Pro tio la monto portas la nomon Xuedou (Xue en la ĉina

lingvo signifas neĝon kaj dou — truo).

La monto Xuedou ŝuldas sian grandan famon al imperiestro Zhao Zhen (1023-1063 sur trono) de la Norda Song-dinastio (960-1126). Iun tagon en sonĝo li venis sur monton eksterordinaran kun pejzaĝo brile bela. Vekiĝinte, li venigis pentriston, por ke ĉi tiu faru pentraĵon laŭ lia sonĝo kaj poste ordonis, ke oni prezentu bildojn pri famaj montoj en la tuta lando kaj komparu ilin kun la pentraĵo. Vidinte la



bildon de la monto Xuedou, li tuj rekonis la monton, kiun li vizitis en sonĝo. Do, li tuj sendis por beni la monton kaj re-kompenci la monaĥojn vivantajn sur la monto, kaj ediktis, ke hakado estu malpermesata tie kaj oni blokadu la monton por forstumado. Dank' al tio, la tieaj loĝantoj estis favorataj kaj liberigitaj el ĉiu servuto. Ekde tiam la monto Xuedou famiĝis tra la tuta lando.

Sur la monto sidas antikva templo Xuedou konstruita en Tang-dinastio (618-907). Poste la templo estis plurfoje detruita en milito kaj ankaŭ plurfoje rekonstruita. La nuna estis rekonstruita en la lasta periodo de la 80-aj jaroj de la 20-a jc. En Ming-dinastio (1368-1644) la templo Xuedou, kiel religiejo de Majtrejo, estis unu el la dek famaj budhismaj temploj de Ĉinio kaj havas gravan pozicion en la budhisma rondo. En la templo imponas grandioza halo por gaje ridanta Majtrejo. En la halo, ambaŭflanke de granda statuo de Majtrejo troviĝas mil statuoj de Majtrejo en diversaj formoj kaj kun vivoplena mieno.

Proksime de la templo multas naturaj vidindaĵoj, el kiuj la plej impona estas la kaskado Qianzhangyan. De la supro de la krutaĵo ĝis la profunda lageto ĝi havas 128 m., kaj meze elstaras giganta roko, al kiu albatiginte, la falanta akvo disŝpruciĝas kaj nebulas vaste. En suna tago ĉarmas bunta ĉielarko super la akvofalo.

Bedaŭrinde, ni vizitis ĝin en senĉesa pluveto. Tamen la falanta akvo kvazaŭ perla kurteno pendas de sur la krutaĵo. Kaj en la aero ĝi nebulis kaj ŝvebis gracie, ĉarme en venteto.

## HEJMLOKO DE FAMA PERSONO

La urbeto Xikou estas ĉirkaŭita de rivero malprofunda, kies fundon kovras rulŝtonoj

grandaj kaj malgrandaj. Tie prosperas verdaj herboj. Agrablas veturado sur bambua floso laŭ la rivero.

Ĉe la enirejo de la urbeto troviĝas pordo, tie antaŭe estis malgranda te-trinkejo destinita por pasantoj. Sur la pordo legiĝas epigrafo farita de Ĉiang Kajšek, la plej alta gvidanto de Kuomintang en la malnova Ĉinio, kiu naskiĝis en Xikou. Tie estas bone konservita loĝejo kun 49 ĉambroj kaj kelkaj vilaoj de la familio Ĉiang. En la malnova ĉambro kun gravuritaj traboj kaj pentritaj kolonoj en eleganta antikva stilo pendas fotoj de liaj familianoj, inkl. de tiuj pri liaj vizitoj al la urbeto. La lokanoj diris, ke jam forpasis 50 jaroj de kiam Kuomintang gvidata de Ĉiang Kajšek malvenkis kaj forkuris al Taiwan. Se la du flankoj ambaŭborde de Taiwan-markolo unuiĝos, la familianoj de Ĉiang povos reveni al la hejmloko.

Por vidi postsignojn de la familio Ĉiang, oni devas viziti Miaogaotai, atingeblan per la vojeto de la kaskado. Tie imponas altaj primitivaj arboj, kuriozas



rokoj kaj smeraldas klara lago. Ĝuste en tiu loko sidas vilao de Ĉiang Kajšek.

Tie regas kvieteco. En tiu medio ŝajnas, ke oni povas percepti moviĝon de nuboj, ĝermadon de herbejoj, murmuradon de akvo... Kia alloga loko!

## TAROJ KAJ MULTTAVOLAJ KUKOJ


En la unua vespero, post kiam ni venis en Xikou, ni manĝis en kolazionejo. El multaj freŝaj legomoj, mi prenis tarojn, kiujn mi neniam manĝis. Ho, ili estas vere bongustaj. Jen kial oni diras, ke vi vane vizitis Xikou sen gustumi taron, unu el la tri ĉefproduktaĵoj de la loko (la du aliaj estas bambuso kaj sukoriĉa persiko), kiun la lokanoj ekkulturis antaŭ 800 jaroj.

Ĉe malgranda strato en Xikou funkcias multaj butikoj, en kiuj oni povas ĝui multtavolajn kukojn ĵus elbakitajn. Ni vizitis tiun de Wang Maolong, iniciatinto de la multtavolaj kukoj. En la butiko estas multaj fornoj similaj al vazo, el kiuj ŝvebas bonodoro. La mastro estas nepo de Wang Maolong. Informiĝinte, ke ni venis de malproksime, li afable regalis nin per multtavolaj kukoj ĵus preparitaj.

La mastro konigis al ni, ke lia avo iniciatis tiun kukon en 1878. Oni preparas tiujn kukojn el faruno, oleo k.a. kaj bakas

super fajro de forno en formo de vazo. En la lastaj jaroj nemalmultaj Taiwan-anoj, kiuj vizitis parencojn aŭ turismis en Xikou, nepre aĉetis tiujn kukojn kun marko Wang Maolong por donaci al amikoj, ke ankaŭ ĉi tiuj gustumu la frandaĵon de la hejmloko. ■

En vespero "Brilas Ruĝaj Lanternoj"



# Alloga ĉina akrobatiko

La vespero harmonie kunligis la prezenton kun la temo kaj aldone per lumoj, muziko kaj danco bone ĝuigis la spektantojn.

de XIAO YI

**L**A ĉina akrobatiko estas longhistoria kaj firme bazita sur popolaj moroj. Wuqiao de Hebei-provinco, Liaocheng de Shandong-provinco kaj Yancheng de Jiangsu-provinco estas ĝiaj luliloj. Oni diras, ke en Wuqiao ĉiuj povas ludi akrobataĵon, inkl. de infanetoj kaj centjaruloj. En la lastaj jaroj la ĉina akrobatiko ne nur venkis multajn teknikajn malfacilojn, sed ankaŭ ŝanĝiĝis en la akrobataj kostumoj, rekvizitoj kaj sceneja dekoracio. Ĝis nun ĉinaj akrobataĵoj gajnis pli ol 100 orajn medalojn en mondaj konkursoj.

## AKROBATIKA VESPERO KUN SPECIALA TEMO

La tradiciaj ĉinaj akrobataĵoj konsistas ĝenerale el diversaj unuopaj programoj kun simplaj

kostumoj, rekvizitoj, sceneja dekoracio kaj muziko. Kun socia evoluo la popolo deziras pli bonajn akrobataĵojn, kaj akrobatiko, kiel antikva arto, absorbis en sin pli kaj pli da moderna estetika nutro kaj ekhavis multe da prezentaj metodoj. En la 80-aj jaroj iuj akrobataj trupoj provis reformadon kaj prezentis akrobataĵojn imite faritajn laŭ tiuj de Tang- kaj aliaj dinastioj, en kiuj la ludantoj estis vestitaj originale. En la 90-aj jaroj furoris akrobata vespero kun speciala temo. En tia vespero la iluminado, scenejo dekoracio, muziko, kostumoj kaj rekvizitoj montris ĉiu sian brilan rolon kaj profunde impresis la spektantojn.

En 1993 la Akrobata Trupo Zhanqi de Chengdu, Sichuan-provinco, premieris "Ora Vento el Sudokcidento — Granda Akrobata Vespero je Naciaj Moroj", sur fono de naturaj

pejzaĝoj de sudokcidenta Ĉinio: Sub la lazura ĉielo kaj blankaj nuboj prosperis verdaj kokosarboj kaj la aktoroj en taj-aj kaj ĝingpo-aj vestoj prezentis akrobataĵojn kun belaj dancoj. En 1994 "Ora Vento el Sudokcidento" prezentiĝis en Pekino kaj faris sensacion en la akrobata rondo kaj la vespero kun speciala temo fariĝis brila ekzemplo en la akrobata rondo.

La akrobata vespero "Hejmloko" ludita de la akrobata trupo de Hebei-provinco odoris kreivecon. La prezidanto de la internacia akrobata festivalo "Morgaŭ" en Parizo opiniis, ke ĝi portas ankaŭ operajn trajtojn. En tiu vespero centoj da akrobatoj prezentis la historion de akrobatiko de sia hejmo en dekelkaj scenoj. La vespero elspiris kaj palacan elegantecon kaj kruelecon sur antikvaj militkampoj kaj honestecon kaj

bravecon de terkulturistoj.

La granda akrobata vespero "Ĉiela Revo" nove prezentita de la Shenyang-a Akrobata Trupo faris sensacion inter la mondaj akrobatikaj recenzistoj, kiuj opinias, ke ĝi estas matura en rakontado. La vespero konsistas el du partoj: "Kosmo" kaj "Ĉinio". En la unua parto oni kreis programerojn "Rivoluo de la Universo", "Ĉielflikado — Flugantaj Homoj" k.a., kiuj manifestas la evoluon de la kosmo, terglobo kaj homaro. Prezente la ĉinan spiriton sur scenejo, oni ludis ankaŭ la programerojn "Filo de la Suno — Homo sur Alta Seĝo", "Flugantaj Steloj Postkuras la Lunon — Aerolitoj kun Akvo", "La Posedaĵo de la Herooj — Ĉina Luktarto *Uŝu-o*". La vespero harmonie kunligis la prezenton kun la temo kaj aldone per lumoj, muziko kaj danco bone ĝuigis la spektantojn.

## GUINNESS-REKORDOJ DE AKROBATAĴOJ

Ĉi-sube mi pritraktos la Soldatan Akrobatan Trupon de la Kantona Garnizonejo, kies ludoj estas altnivelaj kaj tre bele aranĝitaj.

La akrobataĵo "En la Firmamento — Seĝosvingo de Virinoj" konsistas el 8 sinsekvaj transkapiĝoj malantaŭen ĉiu kun 720 gradoj, transkapiĝo de 1 440 gradoj en la aero kaj 3 sinsekvaj transkapiĝoj. La malfacilaj kaj danĝeraj movoj montras la homan ambicion konkeri la kosmon. "Trairi Teran Ringon" postulas, ke la aktoroj transsaltu la ringon 3-foje, sin fleksinte trairu la ringon 3-foje kaj sin turnu 360 gradojn por trairi la ringon 4-foje. Iu aktoro 5-foje transsaltis la ringon 2.46 metrojn altan, per kio li starigis Guinness-rekordon.

## NACIAJ TRAJTOJ

Aŭguste de 1998 en la Nederlanda Reĝa Operejo ĉe

rivero de Amsterdamo regis forta orient-nacia arta etoso. 12 ruĝaj lanternoj kun 12 jar-simbolaj bestoj kaj centoj da diversformaj lanternoj brilis super la scenejo. La malforta lanterna lumo donis misteran orientan etoson. En tiu atmosfero leviĝis lanternoj por la granda ĉina akrobata vespero "Brilas Ruĝaj Lanternoj".

Jen leviĝis la kurteno. Brilis granda ruĝa lanterno. En klaronado ekbrilis ankaŭ la 8 ruĝaj lanternoj ambaŭflanke de la scenejo. Sursceniĝis geaktoroj en vestoj nigraj kaj ruĝaj akompanate de orienta muziko, alte tenante po unu ruĝan lanternon kaj svingante po unu ruĝan silkan rubandon. La ĉina nacia etoso forte allogis la rigardantojn.

La vespero ne nur paradis per tradiciaj ruĝaj lanternoj de Ĉinio, sed ankaŭ elspiris la nacian spiriton per sia riĉa repertuaro. Mi ĝuis la akrobataĵon

"Ĉina Novedzino kun Ruĝa Tapiŝeto sur la Kapo". Juna novedzino kun ruĝa tapiŝeto sur la kapo sidis sub ruĝa lanterno. Ŝi deprenis la tapiŝeton kaj lerte turnadis ĝin per la manoj. La hontema orienta knabino ĉarmis la rigardantojn per sia lerta akrobatiko. La ludo montris la ĉarman allogon de la ĉina knabino.

La granda vespero "Animo de Ĉinio" prezentita de la Ĉina Akrobata Trupo, Pekino, bone montris akrobatikon, *uŝu-on*, dancon kaj operon kaj multe ĝuigis la spektantojn. Sur la scenejo vidiĝis la impona Granda Muro, antikva imperiestra palaco, popola kvadrata loĝejo en pekina

stilo, ili ĉiuj elspiris tipajn naciajn trajtojn. Jam de sia komenco la vespero forte interesis la eksterlandajn rigardantojn. Ĝi estis prezentita en Novjorko, Dallas, Houston, Atlantika Urbo kaj aliaj lokoj de Usono kaj faris sensacion en tiuj lokoj.

Konforme al la karikaturna filmo "Mulan", ĉinaj akrobatoj prezentis la akrobataĵan serion "Mulan" kun rakontaj intrigoj verkitan de la Eŭropa Guinness-ensambleo, kio multe ĝuigis la eksterlandajn rigardantojn. En la unua sceno aro da junaj knabinoj bele dancis, turnante telerojn kaj ludante diabolon por montri la



Turnado de tapiŝetoj

feliĉan vivon antaŭ la milito. En la tria sceno "Solenado de la Triumfo" estis leon-danco, ludo de ventumiloj kaj piedludo de seĝoj kaj fine imperiestro prezidis la nupton de heroino Mulan kaj generalo Shang. Sur la scenejo sinsekve prezentiĝis ludo de vazego, danco kun ruĝaj silkaj rubandoj kaj kolektiva ludo de *uŝu-o*. Jen leviĝis jen malleviĝis la ora kaj arĝenta drakoj... Tiam la ludo atingis sian kulminon. La direktoro de la prezenta departemento de Guinness-ensambleo diris: "Tio estas la plej bela ludo, kiun mi rigardis post la fondiĝo de nia departemento." ■



# Amo kaj saĝo donas forton

de LI SHIJUN

**LOTUS-LANTERNO:** Bildrakonto esperantigita de Yu Tao, eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo, 2000. Formato 22.5X16.5, 112 p. Prezo: 8.00 USD sendokosto: 3.00 USD

Diino Sanshengmu enamiĝis al homo Liu Yanchang kaj volis descendi en la homan mondon por vivi en amo, sed ŝia frato Erlang forte oponis kontraŭ tiu ribelemo kaj ŝin persekutis. Li forrabis de ŝi la fileton Chenxiang kaj la magian lotus-lanternon, per kiu ŝi protektis sin. Li eĉ metis ŝin sub monton por ŝin puni.

Chenxiang klopodis elsavi sian patrinon per la helpo de simieto kaj la tera dio, kiu proponis, ke li petu helpon de la budhiĝinta potenca simio Sun Wukong. Chenxiang ŝtelis la magian lotus-lanternon el la trezora domo. La gardantoj tion

rimarkis kaj lin persekutis. Chenxiang kuris en sakstraton, kie knabino Gamei lin lasis en pordon kaj savis lin. Ankaŭ Gamei malamis Erlang, ĉar li devigis ŝian patron skulpti statuon de Erlang el magia ŝtono.

Chenxiang fariĝis junulo kaj amikiĝis kun bestoj en la naturo. Li trovis Sun Wukong, sed tiu ĉi ne volis interveni en la aferon nek instrui al li batalarton. Li vokis al la ĉielo por helpo, kaj la voĉo de la patrino diris al li, ke saĝo kaj amo donos al li forton kaj helpon.

Chenxiang revenis al Sun Wukong kaj diris, ke li, kiel budho, ne devas resti indiferenta antaŭ la maljustaĵoj. Sun estis kortuŝita de la saĝa junulo kaj donacis al li blankan ĉevalon, kiu portis lin al la magia ŝtono. Kune kun la vilaĝanoj sub lia gvido, li ĝin puŝis en fajran lagon kaj la magia ŝtono fariĝis magia hakilo.

Erlang klopodis malhelpi Chenxiang per serpentoj, sed ili estis forigitaj per la magia hakilo. Erlang lin ligis per lumŝnuro, sed la magia lanterno detruis la lumŝnuron per sia brilo. Fine Chenxiang dishakis la monton kaj elsavis sian patrinon. Sun Wukong formis ĉielarkan ponton el sia magia bastono por unuigi la patrinon kaj filon.

Chenxiang rekuniĝis kun la patrino en sceno plena je amo, paco kaj harmonio.

Tiu ĉi bela fabelo pri amo, saĝo kaj kuraĝo ilustrita per vivecaj bildoj en brilaj koloroj estas adaptaĵo de movbilda filmo, kiu interesis multajn ĉinajn infanojn. Kredeble ankaŭ la Esperanta versio interesos alilandajn infanojn. La tekstoj en facila lingvo estas taŭga legaĵo kaj por infanoj kaj por komencantoj plenkreskaj. Mi rimarkis pokajn preserarojn, kiuj tamen ne malhelpas la legadon. ■

## ***Orienta Tempo*, utila por koni la nuntempan Ĉinion**

*Orienta Tempo*, fondita en tiu ĉi jaro en Vankuvero, Kanado, estas ĉinlingva semajna gazeto, la unua tia ĉina periodaĵo registrita kaj eldonata eksterlande, kun 30 milionoj da transmaraj ĉinaj abonantoj. *Orienta Tempo* kun nesimpligitaj ĉinaj ideografiaĵoj raportas ĝustatempe kaj ĉiuflanke pri la politiko, ekonomio, eduko, kulturo, sciencoj, novaĵoj kaj socia vivo de Ĉinio.

*Orienta Tempo* prezentas al la transmaraj ĉinaj legantoj la aktualaĵojn ne nur de la ĉeftero de Ĉinio, sed ankaŭ de ĝiaj regionoj Hongkong, Makao kaj Taiwan, ke la legantoj bone konu la situacion de Ĉinio, ĝian socian evoluon kaj ŝanĝiĝon kaj ĝiajn leĝon kaj ekonomian politikon kaj akiru informojn de diversaj ĉinaj departementoj kaj regionoj pri programoj por enkonduki entreprenistojn kaj kapitalon el eksterlando kaj eblecoj por komerca kunlaboro. *Orienta Tempo* informas pri turismo, loĝo kaj aĉeto en Ĉinio kaj pri eduko, kuracado, sanprotektado, trafiko kaj veterprognozo, tiel ke la legantoj povos eventuale fari investadon, turismadon kaj vizitadon de parencoj en Ĉinio, peti kuracadon aŭ viziti lernejon en Ĉinio.

Kiel peranto de interkontakto, la Pekina Internacia Kultur-konumika Centro Sihai Huaren, kiel agentejo de *Orienta Tempo* en Ĉinio kaj kiel ĝia ĉefa ĉina investanto, ĉiam afable servos por la kultura, ekonomia kaj scienc-teknika intrerŝanĝo kaj kunlaboro de ĉiuj personoj en kaj ekster la lando, por eniro de ĉinaj entreprenoj en la internacian merkaton, por diskonigo de granda progreso de ĉinaj municipoj, provincoj kaj aŭtonomaj regionoj kaj por ilia enkonduko de entreprenistoj kaj kapitalo el eksterlando. La centro bone servos al la alilandaj ambasadorejoj kaj firmaoj en Ĉinio pri reklamado, konsultado, investado k.c.

Adreso: Sihai Huaren Guoji Wenhua Chuanbo Zhongxin, Xianxiao Hutong No. 10, Dongcheng Qu, Beijing, CH-100005 Ĉinio

Tel.: (008610) 65124187 / 65124183 / 65124061 / 65124065

Telefakso: (008610) 65124178

Retpoŝto: [business@oversea-chinese.com](mailto:business@oversea-chinese.com)



# 集萃夏精髓

# 譜世紀宏章

## Oriente Tempo, utila por koni la nuntempan Ĉinion



### 東方時報 简介

《东方时报》是2000年于加拿大温哥华创办的中文新闻周刊，是中国第一家海外注册、出版，面向海外三千万华人发行，及时、真实、全面、客观、深入报道中国政治、社会、经济、科教、文化新闻及资讯的媒体中文周报。

《东方时报》的办报宗旨是：使海外读者对中国大陆及港、澳、台地区所发生的事件，无所不知，从而对中国的形势能够准确判断，对国内社会的发展、变化能够及时了解。同时，根据海外企业对加商机，对中国国内的旅游、住宿、购物、教育、医疗、法律、签证、移民、留学、探亲、探亲和为他们回国投资、旅游、探亲、求医、就学提供可贵的信息服务。

作为对外联络和服务的窗口，《东方时报》中国办事处及《东方时报》中国北京四海国际文化传播中心将一如既往地竭诚为国内外各届人士在文化、经济、科技等诸多领域提供合作服务，为中国企业走向国际市场，为中国各省市宣传家乡巨变、招商引资以及为海外侨胞、商社提供优质的广告服务、信息咨询、投资顾问及其他相关的服务内容，敬请垂询。

**東方時報**  
ORIENTAL TIMES

李瑞瑛應邀對加拿大進行正式友好訪問

席琳·狄谷  
外交形象顧問

联系地址：北京市东城区先晓胡同10号  
 邮政编码：100005  
 联系电话：(010) 65124187 / 65124183  
 65124061 / 65124065  
 传 真：(010) 65124187  
 E-mail: business @ oversea-chinese.com





La Granda Muro en Pekino

Foto de BIAN ZONGHE

ISSN 0032-4361



9 770032 436009

世界语《中国报道》二〇〇〇年第八期  
(本刊代号: 二一九一五) 国内统一刊号: CN11 1339/G2